8-a JARO, N-o 384



LEIPZIG, 10. / 3. 1932

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS dusemajne	REDAKTEJO: 14, av. de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerĥner, Kolmstr. 1, Leipzig O 27 (Germanio).	APERAS dusemajne

LA ĈIN-JAPANA KONFLIKTO.

Milito, denove milito! El la Ekstrema Oriento atingas nin ĉiutage maltrankviligaj, fatalaj depeŝoj: Manĉurio invadita de l'japana armeo, Ŝanĥajo bombardita, stratbataloj inter japanaj k ĉinaj trupoj, la registara urbo de Ĉinio, Nankino, atak-minacita. Protestoj de Usono k de aliaj imperiistaj potencoj, kiuj ne ĝenas nek malhelpas la celkonscian agadon de Japanio sur la kontinento.

Kio estas ĉe la bazo de tiu ĉi agado? Kiel estiĝis tiu konflikto, kiu fariĝis sanga milito, k kiun signifon ĝi havas en la mondhistoria evoluo?

Ni prenu la landkarton k rigardu tiun longetenditan insulon, pli vere ĉenon da insuloj en la nordo de l'Pacifiko, proksime de l'bordoj de Siberio, de Koreo, de Manĉurio k Ĉinio, kiu formas politikan k ekonomian unuon sub la nomo *Japanio.* Ni konstatu, ke ĝi estas dense surloĝata de precipe malriĉa popolo laborema. Kaj en sudokcidento, sur la alia flanko de l'maro, ni trovu *Ĉinion,* grandegan landon, kie same dense kunpremiĝas malriĉaj, bravaj homoj. En la nordo de Ĉinio, kiu parte sur la kontinenta flanko estas ĉirkaŭita per murego, troviĝas regiono nomata *Manĉurio,* regiono trioble pli granda ol Granda Britio kun Irlando.

En tiu lando fakte la *manĉuroj,* kiuj donis la nomon al ĝi, tunguza gento, kies prauloj laŭ ilia propra opinio estis la *juĉoj* aŭ *niuĉoj,* hodiaŭ formas nur tute sensignife malgrandan reston. Male, la ĉinoj, kiuj trapenetris k *koloniigis* la landon, formas la grandan plimulton: estas ĉ. 20 milionoj da ili en Manĉurio. Troviĝas tie krome 1 miliono da koreanoj, 250 mil japanoj, 200 mil rusoj k plie malnov-aziaj (tunguzaj aŭ mongolaj) popol-restoj. Sume vivas en Manĉurio 27,5 milionoj da loĝantoj. Sed en la mezepoko la fortoproporcioj estis tute aliaj: tiam, en la 13-a jarcento, sub Ĉingis-kano estis la *manĉuroj* la konkerantoj, kiuj subjugigis al si la per antaŭaj bataloj kontraŭ la mongoloj malfortigitan Ĉinion, k forpelite poste de la ĉinoj, ili revenis duan fojon en 1664 k sukcesis ekregi la landon. Tiuj konkerantoj iom post iom tute malaperis inter la ĉinoj, tiel ke veraj nemiksitaj manĉuroj ekzistas nur malmultaj.



Kamparanoj el Norda Ĉinio.

En la Manĉuria nordo troviĝas la sovetia *Orienta Siberio,* sudoriente la granda duoninsulo *Koreo;* markolo kondukas de la Flava Maro k Orientĉinia Maro al la Japana Maro.

Antaŭ proksimume 40 jaroj Rusio komencis minaci Ĉinion, ĉar ĝi deziris havi havenojn ĉe la Orienta (Flava) Maro, kies akvo ĝenerale ne glaciiĝas. Ĉinio cedis al tiu deziro en 1898, sed en 1900, kiam Ĉinio provis forpeli el sia lando la fremdulojn, Rusio respondis okupante la tutan Manĉurion.

Japanio en 1895 batalis kontraŭ Ĉinion, k venkante konkeris bordostriojn manĉuriajn apud la Flava Maro. Tamen sub la minaco de Germanio k Francio, Japanio devis cedi tiujn teritoriojn, k Rusio post tri jaroj akiris ilin. Japanio kompreneble malkontentis pro tio. La japanoj timis, ke Rusio eĉ povus okupi Koreon k tial postulis, ke ĝi forlasu Manĉurion. Rusio malatentis tiun postulon. Tiam en 1902 Japanio interligiĝis amike kun la angloj, kiuj tiam malmulte simpatiis al Rusio k Francio. Kun tiu apogo Japanio povis militminaci Rusion en 1904, por trudi la foriron el Manĉurio. La rusoj rifuzis k komenciĝis la rus-japana milito, kiu daŭris ĝis 1905 k finiĝis per la malvenko de l' rusoj, kiuj devis forlasi Manĉurion. Japanio ricevis la permeson konstrui fervojon en Suda Manĉurio k konsideri kiel sian teritorion la tiun linion ĉirkaŭantan regionon. Ĉinio ricevis la rajton regi super la resto de Manĉurio.

Sed en 1910 Japanio alpropigis al si Koreon k elspezis tiam ankaŭ multe da mono por la manĉuria fervojo k la ĉirkaŭa teritorio; tamen la japanoj ne emis enloĝi Manĉurion pro la por ili malagrabla klimato. Dume la ĉinoj amase enmigris Manĉurion, sed siaflanke ne elspezis kapitalon por konstruoj ktp. La ĉinoj simple venis kiel terkulturistoj k ankaŭ kiel komercistoj.

Sekve de la granda milito Japanio forprenis de Germanio kelkajn teritoriojn ĉinajn apud la Flava Maro k komencis fari kondiĉojn al la ĉinoj rilate tiujn regionojn, dezirante minactimigi ilin. Usono, kiu deziras la senkonkuran regadon super la Pacifika oceano, komencis maltrankviliĝi pri tiu japana aktiveco; ankaŭ la instaliĝo de multaj japanoj k ĉinoj en Usono k Kanado estis malbone konsiderata de l'usona registaro. La sinteno de ĉi lasta fariĝis pli k pli malamika rilate Japanion; tamen okazis per la usonaj klopodoj interkonsentoj inter la grand-

aj potencoj interesitaj pri la Pacifiko (inkluzive Japanio) en 1921 k 1922, kio plibonigis la uson-japanajn rilatojn.

Sed en Ĉinio la situacio plimalboniĝis: granda nombro da ĉinaj generaloj komencis interbatali; aliflanke multaj en Ĉinio, precipe la revoluciema laboristaro k studentaro, deziris forpeli la fremdajn imperiistojn el Ĉinio. Ĉi lastaj tuj respondis al tiuj celadoj per plifortigo de siaj armeoj en Ĉinio, k Japanio aparte avidis plifortigi sian influon en Manĉurio k ankaŭ en Ŝanĥajo.

Oni vidu, ke ĝia nuntempa interveno havas ĉe la bazo pure ekonomiajn konsiderojn. En Japanio la silk-eksporto konsistigas 40 % de l'tuta eksporto, k 9/10 el tiu ĉi kvanto estas venditaj en Usono. La duono de l'japanaj farmistoj vivas el la silkokulturo, k en normalaj tempoj 20–25 % el la japanaj laboristoj laboras en la silkoŝpinejoj. La ekonomia ekvilibro de Japanio dependas grandparte de la prospero de Usono sola k ĝia kapablo aĉeti la krudan silkon. La usona ekonomia katastrofo de 1929 havis sur Japanion la samajn efikojn kiel tertremo.

La due plej grava eksport-produkto de Japanio estas la kotono, ŝpinita aŭ teksita. Silko k kotono estas la bazo de l'japana kapitalakiro por la industria disvolvo de l'lando. Japanio perdis pro la ekonomia krizo la usonan merkaton por sia silko, k depost kelkaj monatoj ankaŭ iom post iom tiun por la disvendo de l'kotono.

Ĉe la supro de sia prospero la japania industrio vendis siajn produktojn en la proporcio de 46% en Ĉinio, en Hong-Kong k la duoninsulo de Kuangtung. La japana kapitalo posedis pli ol 41% el la ĉinaj teksiloj. La grava fakto, de l'ekonomia vidpunkto japana, estas, ke la bojkotado al japanaj produktoj komenciĝis en Ŝanĥajo k de tie etendiĝis al tuta Ĉinio. La japana kotoneksporto al Ĉinio malaltiĝis de 38 500 000 da kubmetroj da kotono en oktobro 1930 al malpli ol 335 000 k.m. en oktobro 1931.

Kontraŭ la daŭraj malamikaĵoj de centoj da milionoj da ĉinoj la japanaj eksport-industrioj devas fiaski. Dum la japanaj armeoj invadis Manĉurion, la angla kotono rekonkeris iujn ĉinajn merkatojn perditajn dum la milito k la produktoj de rusaj manufakturoj vendiĝas en Ĉinio, laŭlonge de l'sudmanĉuria fervojo. Tial Japanio, fidante al siaj moderne ekipitaj armeo k ŝiparo, elektis kiel solvon por superi la krizon, la militon kontraŭ Ĉinio, okupis tutan Manĉurion k celas okupi plie la plej gravajn havenurbojn ĉiniajn.

Dume la Ligo de Nacioj restas neŭtrala, tial ke *jure* ne ekzistas milito inter Japanio k Ĉinio, sed bedaŭrinde *fakte* terura buĉado okazas. Alia tre bedaŭrinda fakto estas, ke la japanaj k ĉinaj laboristoj ne estas ankoraŭ sufiĉe klaskonsciaj k organizitaj por malobei al siaj respektivaj generaloj k aliigi la nunan nacian militon en klasmiliton.



LA TAGO DE LA PARIZA KOMUNO.

La 18-an de marto ĉiu konscia proleto estas denove memorigata pri la ribelo de l'Pariza popolo en la jaro 1871, konata sub la nomo La Komuno de Parizo. *La Parizanoj delegis sian revolucian registaron en la nomita tago, sub eksterordinaraj kondiĉoj, tiuj de nacia k civila milito, kiuj ne permesis al ĝi pli longan ol dumonatan regadon. Fine de majo estis forrenversataj de la senindulgaj malamikoj de l'popolo la lastaj barikadoj, silentis la lastaj pafilegoj de l'komunanoj post forpafo de l' tuta municio, dronis en sango la esperoj pri nova aŭroro.*

La sekvanta priskribo estas eltirita k tradukita el la libro de Lisagare *(Lissagaray): „Historio pri la Komuno de 1871." Ni rimarkigu aldone, ke la aŭtoro mem partoprenis en la Komuno k pentras al ni per emociigaj, esprimplenaj linioj proprajn viditaĵojn.*

Red.

Senbridigita soldataĉaro.

Kiel do mirige, ke kun similaj ĉefoj, la senbridiĝo de l' soldato atingis ebristaton tian, ke la morto ankoraŭ ebriigadis lin! Dimanĉon, la 28-an[1] laŭlonge de la urbodomo de l'XI-a[2], kie estis apogitaj kadavroj, ni vidis marist-fuzilieron bobeni de sia bajoneto la intestojn, kiuj glitis el la ventro de virino; soldatoj, sur la bruston de l'federitoj[3], amuzis sin fiksi anoncskribojn: *Murdisto, ŝtelisto, drinkulo*, k, en ilian buŝon, botelkolojn.

Kiel klarigi ĉi tiujn subtiligitajn kruelegaĵojn? La oficiala raporto de Mak-Mahon atestas nur pri 877 Versajanoj[4] mortigitaj depost la 3-a de aprilo ĝis la 28-a de majo. La Versajana senbridiĝo do ne havis kiel senkulpigon venĝan repagon. Kiam areto da incitegitoj, por venĝi milojn da siaj fratoj, mortpafas sesdek tri garantiulojn[5] el proksimume tricent, kiujn ili havas en siaj manoj, la reakcio vualas sian vizaĝon k protestas je la nomo de la justo. Kion do diros ĉi tiu justo pri tiuj, kiuj, metode, sen angoro pri la eliro el la batalo, k precipe la finita batalo, mortpafis dudek mil personojn, el kiuj tri kvaronoj almenaŭ ne estis batalintaj? Ankoraŭ, kelkaj ekbriloj de homeco trafulmis la soldatojn k oni vidis el ili reveni iujn post la ekzekutado kun klinita kapo. La bonapartistaj[6] oficiroj ne moliĝis en sia sangsoifego. Eĉ post la dimanĉo,

[1] 28-a de majo 1871.

[2] XI-a Pariza urbdistrikto (kvartalo).

[3] Anoj de la Komuno (precipe la soldatoj de l'nacia gvardio, konsistigita el la Pariza respublika loĝantaro).

[4] Anoj de la reakcia (blanka) armeo formita de la forpelita registaro sub gvido de Tjer (Thiers).

[5] *Noto de Lisagare:* Kvar ĉe Sankta Pelagio, ses ĉe la Roketo, kvardek ok strato Akso (Haxo), kvar en la ĉirkaŭo de la Malgranda Roketo.

[6] Anoj de la Napoleona, imperiestra, monarkista partio.

ili mem buĉis kaptitojn; la kuraĝon de l'viktimoj ili nomis „impertinento, decidemo ĉesigi prefere la vivon ol vivi laborante.“ La nesatigebla kruelo — jen la filistra, banala etburĝo.

Teruregaj spektakloj.

„La tero estas sternita per iliaj kadavroj“, telegrafis s-ro Tjer (Thiers) al siaj prefektoj, „tiu ĉi abomena spektaklo servos kiel leciono.“ Necesis malgraŭ ĉio fini tiun ĉi aferan lecionon. La pesto, ne la kompato, venis. Miriadoj da karbunklaj muŝoj ekflugis de la putrantaj kadavroj. La stratoj kovriĝis per mort-birdoj. La *Estonto liberala* (L' Avenir libéral), laŭdante la proklamojn de Mak-Mahon, aplikis al li la parolojn de Fleŝje (Fléchier): „Li kaŝas sin, sed lia gloro lin malkovras.“ La gloro de la Turen (Turenne)[7] de 1871 malkovris sin ĝis en la Sen (Seine) vejnita per longa poststreko de sango, kiu forpasis sub la dua arkaĵo de l'Tuileria ponto. La mortintoj de l' sanga semajno sin venĝis, pest-infektante la parketojn, la malplenajn terenojn, la domkonstru-lokojn, kiuj servis kiel malŝarĝejoj al la buĉejoj k escept-stataj tribunaloj. „Kiu ne memoras“, skribis la *Tempo* (Temps), „se li vidis, eĉ nur dum kelkaj minutoj, la parketon, ne, la kadavrejon de l'Turo de Sankta Jakobo? El la mezo de tiu malseka teraĵo freŝe translokita per la pioĉo, elstaris tie k ĉi tie kapoj, brakoj, piedoj k manoj. Profiloj de kadavroj videbliĝis ĉe la supraĵo de l'tero, estis malbelege. Malagrablega naŭza odoro eliris el ĉi tiu ĝardeno. Dum momentoj, en iuj lokoj, ĝi fariĝis fetora.“

En la parko Monso (Monceau)[8], antaŭ la Invalidoj (Invalides), fermentitaj de la pluvo k la suno, la kadavroj krevigis sian maldikan mortotukon el tero. Tre granda nombro restis ankoraŭ ĉe la aero, sole surŝutetitaj per kloro; ĉe la antaŭurbo Sankta Antonio oni vidis da ili amasojn „kiel rubaĵon“, diris ord-ĵurnalo[9]; ĉe la Politeknika lernejo, ili kovris cent metrojn je longo k tri je alto; ĉe Pasi (Passy), kiu ne estis unu el la grandaj centroj de ekzekutado, troviĝis mil cent proksime de l'Trokadero. Tricent, kiuj estis ĵetitaj en la lagojn de la montetoj Ŝomon (Chaumont), resupreniĝis al la supraĵo k, ŝveligitaj, promenigis siajn mortajn efluvojn[10]. La gloro de Mak-Mahon malkovris sin troe. La ĵurnaloj ektimegis. „Ne necesas“, skribis unu, „ke tiuj krimuloj, kiuj al ni faris tiom da malbono dum sia vivo, povu al ni fari ankoraŭ iom post sia morto.“ Tiuj mem, kiuj incitis al la buĉado, kriis: „Sufiĉe!“

„Ni ne mortigu plu!“ skribis la *Pariza Ĵurnalo* (Paris-Journal) de l' 2-a de junio, „mem la mortigintoj, mem la agitegintoj! Ni ne mortigu plu! Ne ilian pardoniĝon ni petas, sed punprokraston.“

„Sufiĉe da ekzekutoj, sufiĉe da sango, sufiĉe da viktimoj!“ skribas la *Naciisto* (National) k *la Nacia Opinio* (l'Opinion Nationale): „Oni postulas *seriozan ekzamenon* pri la kulpigitoj. *Oni volus vidi morti nur la verajn kulpulojn.*“

La ekzekutadoj plimalrapidiĝis k la balaado komenciĝis. Veturiloj ĉiuspecaj, mebloveturiloj, benkveturiloj, omnibusoj, kolektis la kadavrojn en ĉiuj kvartaloj. Depost la grandaj pestoj oni ne vidis tiajn plenĉarojn da homa viando. Per la tordiĝoj de la nenatura agonio estis facile rekoneble, ke multaj, vive enterigitaj, luktis kontraŭ la tero. Iuj kadavroj estis tiel putrintaj, ke oni devis ilin en fermitaj vagonoj konduki plej rapide en kalkfosojn.

[7] Franca marŝalo el la epoko de la Tridekjara milito, venkinto en multaj bataloj.

[8] Ĉi tiu k la sekvantaj lokoj cititaj troviĝas senescepte en Parizo.

[9] Ĵurnalo de la reakcia ordo.

[10] Kvazaŭ nereala, mistera aperaĵo.

POR NIA MEDITO.

Vivi laŭ siaj deziroj estas vulgare: honestulo aspiras al la ordo k al la leĝo. Gete (Goethe)

*

Preskaŭ ĉiuj leĝoj estas sintezoj el neeblo. Kaj tio estas bona: estas per postulo al neeblo, ke oni atingas eblon. Gete.

*

Nur la tutplena sinforgesemulo indas regi, k povas tion fari. Gete.

*

Pacienco, espero, fido, amo, ĉiuj tiuj virtoj estas la aganta, plenumanta inteligento. Gete.

*

Tio estas eterne vera: limigi sin, bezoni nur unu objekton, aŭ malmulton, ĝin tre ami, al ĝi sin dediĉi, kun ĝi identiĝi, tio faras la poeton, la artiston — la homon. Gete.

Malsatego furiozas en la norda parto de Japanio.

En gubernio de Aomori la grenrikolto estis treege malbona en 1931. Plie la rikolto de pomoj, kiuj estas la ĉefa produkto de tiu ĉi provinco, ankaŭ estis tre malbona. Pro tio la kamparanoj suferas duoble.

Kaprica vetero, forta vento k prujno en la maturiĝa sezono, kaŭzis ĉi tiun misrikolton. Krome multaj junuloj en ĉi tiu provinco estis devigataj iri al Manĉurio por militi, pro tio ke junuloj en tiel malvarma norda provinco povas elporti la teruran malvarmegon en Manĉurio, al kiu neniu japano (eĉ ne nord-japanoj) kutimiĝas. Sen junuloj, kiuj estas solaj laborantoj en la tuta familio, iuj familioj, kie restas nur maljunuloj aŭ virinoj kun infanoj, havis multoblan kaŭzon por suferi.

Ni vidu jenan tabelon:

Nomo de vilaĝoj	Nombro da kamparanaj familioj	Nombro da familioj, kiuj nenion rikoltis	Tiuj, kiuj trionon rikoltis	Tiuj, kiuj duonon rikoltis	Tiuj, kiuj rikoltis ordinaran kvanton
Kanita	259	72	149		39
Imabecu	246	46	156		
Ŝoonai	138	99	29	11	

La loĝantoj manĝis terpomojn, poste elfositajn filikajn radikojn, sed kiam neĝo kovras la kampojn, ili havas nenion por manĝi. Ĉe lernejoj infanoj kun palaj vizaĝoj ofte falis dum lecionoj; ili ne povis elporti la malsategon. En vilaĝoj oni ne povas pagi imposton nek salajron al la instruistoj.

La malsatego en Hokkaidoo, pli norde situita ol Aomori.

La malsatego pro malbona rikolto en ĉi tiu vasta insulo estas senkompare terura. La plimulto el la kamparanoj en Hokkaidoo estas tre malriĉaj farmistoj aŭ novaj transmigrintoj el la ĉefinsulo (Japanio konsistas el insuloj). Ilia ĉiutaga vivo estis ĉiam mizera. Eĉ en normala jaro ili ĝenerale ne povis havi sufiĉan manĝaĵon. Kaj pro la malbona rikolto nuna ili plene mizeriĝis. Tiuj, kiuj povas manĝi nematurajn rizerojn, avenon, maizon k poligonon, estas sufiĉe feliĉaj. Aliaj manĝas radikojn de filikoj k sovaĝajn kreskaĵojn. Pro malbona manĝaĵo la kamparanoj suferadas de malsano, kiun kaŭzas maldigesto. Sed ili ne povas sin flegi, k pro manko de kuracado grave malsanaj homoj pli k pli multiĝas, k preskaŭ ĉiu familio havas malsanulon.

En Hokkaidoo 92 574 familioj estas farmistoj, kiuj konsistigas 50 pocentojn el la tuta tiuregiona kamparanaro. El ili 50 000 familioj rikoltis nur la duonon, k plie aliaj produktoj ankaŭ estis tute nerikoltataj.

Ne trovante manĝaĵon sur siaj kulturitaj kampoj, ili iradas al la montoj por trovi sovaĝajn kreskaĵojn. Ofte, antaŭ ol ili trovas manĝeblajn kreskaĵojn, ili renkontas ursojn, kiuj, ne trovante nutron sur montoj, kie la kresko estis ankaŭ ege malbona pro la vetero, envenas la vilaĝojn por serĉi manĝaĵon. Jen oni vidas mortigan batalon inter malsategantaj homoj k ursoj.

En gubernio Iŭate, ĉe iu stacidomo oni vidis jenon: Tuj post kiam vagonaro forlasis la stacidomon, vilaĝaj infanoj salte, fluge, kuregis post ĝi, laŭte kriante k etendante siajn brakojn. Ili avide atendas trapasantan vagonaron, por ke ili povu ricevi manĝaĵojn, kiujn pasaĝeroj donace ĵetas al ili tra la fenestroj.

Stelaro.

„Leĝo k ordo“ en Kalifornio.

„La plej sukcesa rabirado dum la Kalifornia historio“ okazis en Long Biĉ (Beach) la 15-an de januaro. Tiam preskaŭ 200 gelaboristoj estis arestitaj de policistoj el Long Biĉ, gviditaj de Ŭ. H. Hajns (W. H. Hynes), ĉefo de la „ruĝa skadro“, kies administrejo troviĝas ne en la policejo, sed en la konstruo de la Los Angeles-a Komerca Ĉambro, kiu jam delonge gvidas k regas sian urbon laŭ sia plaĉo, k kiu povebria pro sia sukceso, konstante serĉas novajn konkereblajn kampojn. Hajns, laŭdire, batas k eĉ arestis sian edzinon, k estas tute fidela hundo al siaj mastroj.

Post la kutimaj esploroj per la plej maldelikataj vortoj troveblaj en la polica lingvo, akompanitaj de batoj k alispecaj kruelaĵoj, oni liberigis ĉiujn, escepte 82, inter kiuj estis 20 virinoj. Sed tion oni ne faris sen stultaj admonoj k teruraj avertoj ne denove ĉeesti kunvenon pritraktanta ekonomiajn temojn.

„La ekonomia krizo“ estis la temo. Sam Darsi (Darcy), redaktoro de la nova „Okcidenta Laboristo“ el San Fransisko, estis la parolonto. Li ne parolis. La atako okazis antaŭ ol li komencis.

Kiam la advokato de la Internacia Laborista Defendo fine, post du-taga vana provo, sukcesis ricevi permeson alparoli la arestitojn, Sam Darsi havis grandan vundon apud unu el la okuloj.

Antaŭmalhelpi advokaton alparoli siajn klientojn estas malobeo al la puna kodo en Kalifornio. Tio, tamen, neniam maltrankviligas la instancojn, kiam temas pri rajtoj de klaskonsciaj proletoj. Konataj krimuloj estas multe pli sekuraj ol konataj komunistoj en la ŝtato de subaĉetantoj.

Laŭ burĝaj gazetoj la policistoj laboris ĝis malfrua horo de l'sabata nokto farante demandojn al individuoj. Ĉi tio signifas, ke ili provis devigi la arestitojn konfesi krimojn, pro kiuj la Komerca Ĉambro deziras kulpigi k kondamni ilin. La sama gazeto konigas al la mondo, ke la policistoj faris ĉion eblan por antaŭmalhelpi eksterajn komunistajn agentojn doni sciigojn k instrukciojn al la arestitoj. Tiel oni montras sian respekton al „leĝo k ordo“.

Post la insultaj esploroj ili liberigis 40 el la arestitoj kontraŭ kontanta kaŭcio de 500 dol. por ĉiu persono. La aliaj restas en la arestejo en Long Biĉ. Ne malmultajn oni provos deporti. Aliujn oni penos sendi al unu el la plen-plenaj pundomoj, same kiel oni faris en San Fransisko antaŭ multaj jaroj al Tam Muni (Tom Mooney). Malobeo al la malvirta „krima leĝo sindikatisma“ provizos la pretekston.

La persekutoj al komunistoj en Suda Kalifornio estas multaj. La 3-an de januaro, kiam ili organizis sian „malsatan marŝon“, la „ruĝa skadro“ atakis la senlaborulojn k senkompate faligis siajn mortigilojn sur la kapojn de tiuj, kiuj malsukcesis forkuri sufiĉe rapide. „Unu post la alia“, skribis nekomunista vidinto, „laboristoj falis al la tero, senkonsciaj pro batoj. La sango de la laboristoj fluis abunde, lasante sian koloron sur la pavimo. Virino estis atakata de kvin policistoj k bategita per bastonegoj, ĝis oni timis, ke ŝi mortus.“

Ankaŭ la 19-an de januaro kvar detektivoj el la „ruĝa skadro“ rabiradis kontraŭ la agentejo de l' „Ĉiutaga Laboristo“ en Los Angeles. Tie, laŭkutime, ili detruis literaturaĵojn k forportis, kion iliaj ebriaj kapoj konsideris utila al la Komerca Ĉambro, kiun multaj opinias la vera registaro de la malfeliĉa urbo.

SAT-ano.

Striko en Nederlando.

La batalo pri salajr-malaltigoj en Nederlando transiris en novan stadion. Unu el la plej reakciaj entreprenistoj de l'tuta mondo, *P. Smit*, kiu posedas maŝin-, ŝip- k kanonfabrikon en Roterdamo, ne kontentiĝas pri la ĝisnunaj malaltigoj al la salajroj oficistaj k laboristaj.

Ĝis julio 1931 ekzistis landa kolektiva labor-kontrakto, kies daŭrigon rifuzis la mastroj ĝenerale, aŭ almenaŭ celis plimalbonigi ĝin. Ili postulis 5 %. an salajran malaltigon k ankaŭ, ke la



organizoj helpu ilin por akceptigi ĝin al la laboristoj. La organizoj kompreneble ne konsentis k la laboristaro malakceptis la postulon.

Kelkajn monatojn poste la entreprenisto P. Smit insistis pri 5%-a malaltigo de l'salajroj. Kaj ankaŭ aliaj mastroj subtenis la postulon, sed nur en Roterdamo k ĉirkaŭaĵo, ne en Amsterdamo. Ĉar tiuloke ankoraŭ estas sufiĉe da laboro k tial la salajro estas pli alta ol en Roterdamo, k la tieaj mastroj ne postulis la malaltigon, ĉar ili restas konkurkapablaj.

Sed la Roterdamaj mastroj postulante venkas certe, kiam ili deziras ion. Post longa intertraktado ili sukcesis forpreni nian monon senbatale. Sed dum la kontraktdaŭro ili ne povis procedi al malaltigo de l'salajro, nur al tiu de l'supertarifa aldonaĵo. Se iu perlaboras hore 65 cendojn, li povas ankaŭ gajni 25 % super la tarifo. Sed la plej granda parto malsukcesis en tio, aŭ se oni perlaboris tiom, la mastroj malaltigis la premion ĝis 10 %.

Per la 5 %-a malaltigo kelkaj laboristoj sekve jam perdis 10 ĝis 15 guldenojn. (Kredeble *semajne*. — Red.)

La direkcio ne estis kontenta; ĝi ekdeprenis denove 5 %, komencante ĉe la oficistoj k submastroj depost la nova jaro, k 14 tagojn poste eĉ 10 % — tiam de ni ĉiuj.

La oficistoj ne povis kontraŭstari, ĉar ili ne estas organizitaj, sed la laboristoj preskaŭ ekstrikis jam unuan fojon. La organiz-estraroj tamen konsilis akcepti k tiutempe la striko estis evitata, ĝis la mastro ree postulis plian malaltigon (je 10 %). Tiam la ĝenerala metallaborista ligo, la katolika k „kristana“ organizoj, decidis neakcepti aŭ striki.

Dum la sekvanta intertraktado la entreprenisto sendis al ĉiuj leterojn hejmen, sciigante, ke li devas maldungi 150 laboristojn k ke li kompreneble maldungos tiujn, kiuj ne konsentus pri la 10 %-a malaltigo. Li diris, ke li devas malaltigi la salajrojn por akiri laboron. Tiel li agis por atingi la edzinojn, skribante ankaŭ tute mensoge pri vivkostoj malaltigitaj je 25 %!

Kelkajn tagojn poste sekvis dua letero kun poŝtkarto, per kiu oni subskribu pri konsento je la 10 %-a malaltigo, aŭ ni estus maldungotaj. Tiel la mastro povus scii, kiun maldungi. Sed li miskalkulis; interkonsente kun la organiz-estraroj *ĉiuj* subskribis, k sekve li ne sciis ankoraŭ, kiun prefere maldungi.

Ĉar la entreprenisto restis ĉe siaj postuloj (li nur volis ŝanĝi la pocenton je 12 % por unu, 8 % por dua grupo), la intertraktoj malsukcesis. Li komunikis, ke tiuj laboristoj, kiuj laboros 6 tagojn dum 14, ne ricevos salajr-malaltigon, k ke tiuj, kiuj volas strikrompi, restu la nokton en la fabriko.

Sed, lunde matene, eniris nur 80 laboristoj, inter ili ĉefe pli ol 50-jaraĝuloj k metilernantoj, gvidataj de policano aŭ gepatroj. Post kelkaj horoj 14 el ili ne plu kuraĝis labori. La entrepreno ne plu povis funkcii. Alian tagon pliaj laboristoj forrestis la laborejon, la nombro da strikantoj estas proks. 700.

Sume laboris ĉe P. Smit 750 laboristoj; la ceteraj jam estis maldungitaj pro la krizo. Iam estis tie okupitaj preskaŭ 2400 laboristoj.

Strikanto (16 959).

Pri la bankproletaro en Germanio.

La plej multaj bankdungitoj ne jam sin konsideras esti parto de la tutproletaro. Eĉ ankoraŭ hodiaŭ ili estas regataj de ideologio propra al estaĵo supera, kiu kompreneble tre kontrastas la realon. Oni kredas esti kvazaŭ „aparta klaso“ inter la aliaj privataj oficistoj. La iama edukmaniero al bankoficista lernanto estis tia, kia kredigis la lernanton havi la avantaĝojn okupi estonte plej altajn oficojn en la bankfako, ja eĉ fariĝi bankestro. Kvankam la edukmaniero al lernanto devis aliiĝi k iom akomodiĝi al la faktoj, tamen la bankestroj komprenas per sia dungmetodo teni for de si proletece sentantajn homojn. La iama edukmaniero esprimiĝas nun en la stranga ideologio de la plej multaj bankoficistoj. Eĉ la kruda realo ne povis senrevigi la grandan plimulton el la bankdungitaro.

En la inflacia tempo oni ankaŭ dungis oficistojn lernintajn en aliaj komerc-branĉoj, ĉar vere la lernintoj en la bankfako ne sufiĉis. Nuntempe tio lasta preskaŭ ne plu estas ebla k la bankentreprenistoj nun prefere dungas nur tiajn personojn komencintajn post lerneja tempo la bankan profesion. La postulo pri kapablo al la lernanto enironta la bankan fakon estas tre alta. Oni postulas la ateston pri sukcesa abiturienta ekzameno en realgimnazio. Kompreneble dum la inflacio la postuloj ne estis tiom severaj. Tial sukcesis eniri la bankfakon ankaŭ elementoj el la konscia proletaro; tiujn oni okaze de oficista malpliigo maldungis ĝis malgranda resto.

Laŭ la dungmaniero oni komprenas, ke la bankoficistoj plej multe devenas el popoltavoloj ne-malriĉaj, ĉar nur tiuj povas finance ebligi kontentigon de la prikapablaj postuloj de bankestroj, k ili plej ofte estas reakciaj. Kompreneble ofte la protekto de iu influhava persono ludas grandan rolon ĉe dungo de lernanto aŭ de oficisto. Menciinde estas, ke oni ankaŭ dungas lernantojn, al kiuj ne eblis viziti la koncernajn lernejojn, sed tiuj estas dungitaj sen lernanto-kontrakto k arbitre povas esti maldungitaj. Ili estas pli malpli nura ekspluat-objekto de la bankentreprenistoj.

Ni vidis, ke la bankestroj klopodas teni for de la bankoj la revolucieman proletaron k gardi tiel sian profiton. Kiom fruktedona estas ilia klopodo, bone montras la fakto, ke multaj bankoficistoj ne estas organizitaj, nek sindikate, nek politike. Krom tio la plej multaj el la organizitaj aliĝas al „flava organizo“ (Deutscher Bankbeamtenverein – Germana bankoficista unuiĝo), sekrete protektata k iafoje subvenciata de l'mastroj. Laŭdire ĝi havas proksimume 40000 membrojn. Ĝia tendenco estas: „La entreprenistoj k dungitoj havas samajn interesojn.“ Tiu ĉi organizo eĉ ne akceptas ĉiujn okupatojn en la banka fako. Oni ne anigas kashelpantojn k samgradajn okupatojn (la tuta t. n. „industria salajro-grupo“). Por tiuj lastaj oni starigis apartan organizon samtendencan. Kial oni faris tion? „Pro fifiero de la granda plimulto el la bankoficistoj.“ La bankoficista profesio laŭ ili superas laŭkvalite ĉiujn aliajn oficistajn kategoriojn. Apud ĉi tiu „flava“ organizo ekzistas komiza organizo, kiu en si havas fakon por bankoficistoj, nomata *„Deutschnationaler Handlungsgehilfenverband“*. Laŭdire ĝi havas proksim. 10 000 membrojn. Leginte la titolon de tiu organizo, certe ankaŭ tiu, kiu ne scias la germanan lingvon, divenas, ke ĝi estas naciista. Malplimulto el la bankdungitoj estas organizita en progresema sindikato *(Allgemeiner Bankangestelltenverband)* havanta proksimume 11 000 membrojn. Ĝi estas fondita mallonge antaŭ la popolmurdado k primokita de sia multnombra kontraŭularo. Post la milito ĝi kontentige kreskis per la revolucia ondo trairanta Germanion. Sed sekve de la multaj maldungoj depost 1924, ĝia membraro malpliiĝis, ĉar la entreprenistoj preferis maldungi revoluciemajn elementojn.

Ĉiuj organizoj menciitaj estas la apogantoj al tarifa kontrakto starigita en 1921 por tuta Germanio kun la bankkapitalistaro. Tiu lasta organiziĝis en du organizoj: *Verband der Bankleitungen* (Grandbankoj) k *Centralverband des deutschen Bank- und Bankiergewerbes* (plejparte privatbankistoj). Esence ili ambaŭ formas falangon kontraŭ la bankdungitaro.

Kompreneble la salajra tarifo depost sia starigo estas multfoje aliigita favore al la mastroj.

La tarifo partigas la bankdungitaron en kvar ĉefajn grupojn, kiuj estas viraj bankoficistoj, bankoficistinoj, en banko okupataj metiistoj inkluzive ceteraj okupatoj nelernintaj la bankfakon, k gelernantoj. Al la tria grupo estas atribuataj la kashelpantoj, pordistoj ktp. La salajro de l'unua grupo (viraj oficistoj) partiĝas denove en tri grupojn laŭ kvalifiko k kapablo (iafoje laŭ favoro). La virinajn dungitojn oni salajras laŭ samaj salajrogrupoj malpli 5 – 10%, escepte la tria salajrogrupo (laŭtarife plej alta), en kiu ne estas diferenco inter virina k vira salajroj. Diferenco ankaŭ ne estas en la unua k dua salajrogrupoj post plenumo de 21 jaroj da servo. Salajro de metiistaj okupatoj ktp estas iom pli malalta ol tiu de l'unua salajrogrupo de oficistoj-viroj. En ĉiu salajrogrupo estas 15 ŝtupoj laŭ nombro da servojaroj. Sed oni diferencigas inter „profesia“ k „serva“ jaroj. La dua termino rilatas la metiistan ktp grupon. Krome la tarifo diferencigas la salajron laŭ 5 lokaj klasoj. La plej alta salajro estas pagata en „aparta klaso“ (Berlino); sekvas loka klaso A (Dresdeno ktp), en kiu estas malpliigo de 4%, loka klaso B kun malpliigo de 8%, loka klaso C kun malpliigo de 12%, k loka klaso D kun malpliigo de 16%. Pagadon al la banklernanto indikas suba tabelo. Krom la gelernantoj oni okupas junhelpantojn (junlaboristojn), kies salajro estas iom pli alta ol tiu de lernanto. Estas menciinde, ke la unua, dua k tria salajrogrupoj havas krom la 15 ŝtupoj laŭ „profesiaj“ jaroj tri ŝtupojn konsiderantaj la aĝon. Jen la salajra tabelo, kiu validas de 1-a de januaro ĝis 30-a de junio 1932:

„Aparta Klaso“
(monata salajro en mk. g.)

Salajrogrupo	I	II	III
17-jarulo	67.97	79.78	92.35
18-jarulo	79.30	93.03	107.74
19-jarulo	90.62	106.37	123.13
1-a „profesia jaro“	113.28	132.98	153.91
15-a „profesia jaro“	193.65	250.56	307.44

Metiista ktp. salajrogrupo		*Lernantoj*	
1-a servojaro	105.89	1-a lernjaro	33.18
15-a servojaro	169.29	2-a lernjaro	59.84
		3-a lernjaro	79.73

Junlaboristoj (junhelpantoj)

14-jara	42.35	17-jara	63.50
15-jara	52.95	18-jara	74.10
16-jara	58.17	19-jara	84.70

Edziĝintoj ricevas aldonon de 20 mk. g. monate; same oni aldonas por ĉiu infano 20 mk. g. monate.

La dungitoj de l'unua ĝis tria grupo rajtas ferii 12 – 21 labortagojn laŭ la „profesiaj jaroj“. La metiista ktp grupo rajtas ferii 9 – 18 labortagojn laŭ la servojaroj. Lernantoj rajtas ferii 9 – 12 k junhelpantoj 6 labortagojn.

La raporto kompreneble ne estas kompleta. Multo ankoraŭ estus raportinda. Tamen la dirito sufiĉas por konatiĝi kun la situacio de l'bankdungitaro en Germanio. Ĝi certe ankaŭ komprenigas la malfacilegan batalon de la progresemaj revoluciemaj bankdungitoj kontraŭ siaj potencaj subpremantoj.

Senheredigito.

Atentigo!

Alvenis tro malfrue la 2-a komuniko por la 12-a Kongreso, por povi aperi en ĉi tiu n-o. Ni komunikas tamen, ke 37 Gek-doj aliĝis ĝis nun; ke estas organizata tendaro por la junularo; unuvorte, ke la perspektivoj por la sukceso de la kongreso estas bonaj. Sed la O.K.K. bezonas monon: ne prokrastu sendi vian aliĝon!

MI VOLAS SCII...

Ĉu la franca revuo „Monde“ forlasis la klasbatalon? Ĉu la Barbus[1]-a organizmaniero estis nesufiĉa? Ĉi tion pretendas „Plan“ (antaŭe skandinava *Monde*). Antaŭan dankon al respondantaj K-doj!

H. Nielsen (Danio).

[1] France: *Barbusse.*

La klasbatalo tra la mondo

Organizo de faŝistaj kontraŭ maldekstraj studentoj (Japanio).

„La Federacio de Patriotaj Studentoj“ naskiĝis okaze de la Manĉuria milito, k ĝi daŭrigas sian naciisman agadon helpante la militantajn armeojn en Manĉurio k iliajn familiojn en Japanio.

Ili pensis, ke la patriotisma movado devas havi fortikan sociosciencan teorion kiel sian bazon. Pro tio ili ĵus fondis „Asocion por studi japanan socialismon“, kies celo estas studado pri faŝismo. La patriota movado celas neniigi la klaskonscion inter la studentoj. Oni intencas enkonduki ĉi tiun movadon ĉe la lernejoj.

Estas notinde, ke la fondiĝo de la „Asocio por studi japanan socialismon“ estigas novan fazon en la universitata movado. Tiu faŝista organizo de studentoj jam stariĝis k aktive ekagas. Ĝi akre kontraŭstaras maldekstrajn studentojn, kiuj apartenas al studenta kooperativo aŭ al studenta rondo por studi socian sciencon. La tuta studentaro en universitatoj nepre preferos aparteni al unu aŭ la alia el ili estonte, k la kontraŭstaro inter la du partoj pli k pli akriĝos. *Stelaro.*

Senlaboruloj manifestacias en Anglio.

La 22-an de februaro okazis gravaj senlaborulaj manifestacioj en Londono k Bristol. Milo da senlaboruloj post amaskunveno en Hajdpark iris laŭgrupe al la parlamentejo, kie okazis kunpuŝiĝoj kun la policistaro. Kelkaj K-doj estis arestitaj. Delegitaro el ok senlaboruloj povis prezenti fine siajn pledojn antaŭ parlamentanoj. En Bristol preskaŭ 6 000 personoj manifestaciis k rezistis al la atakoj de l'policistoj, kiuj celis dispeli ilin. Tridek personoj estis grave vunditaj dum la batalo.

De la kontraŭfaŝista fronto en Aŭstrio.

Sekve de la konfiskado de armiloj en Viena laborista kvartalo la „socialdemokrata partio“ organizis propagandagadon por rekruti novajn anojn al la socialistaj organizoj k institucioj. Laŭ la „Laborista Gazeto“ la rezultoj estis, ke sin anoncis pli ol 10 mil novaj rekrutoj por la Defendligo socialista. Por aĉeti armilojn k municion estis kolektataj pli ol 45 mil ŝilingoj (proks. 6500 dolaroj) dum kelkaj semajnoj, nur en proletaj rondoj. *R. P.*

La malliberuloj de Musolini.

En kaŝe en Italio disvastigata flugfolio oni donas informojn pri la kondiĉoj en la insuloj, kien estas transportitaj malliberuloj. 1200 el tiuj deportitoj estas gardataj per duobla milica kordono, kun po unu gardostaranto por kvindek metroj; ili havas nenian eblon labori k estas ĉiutage sisteme provokataj k eĉ batataj ĝissange, ĉe la okuloj de siaj edzino k infanoj, duone mortaj pro malsato. Sur malvastega teritorio, iliaj suferoj estas senfinaj.

Nur en la vulkana insulo Lipari estis inter 500 deportitoj dum unu jaro 118 ftizmalsanuloj, 43 vunditoj de la itala milico, 2 bastonmortigitoj; 107 el la deportitoj estis punataj tute malmjuste al karcerpunoj de 3 ĝis 10 monatoj, kiujn ili devis suferi en la teruraj malliberejoj de Liparo k Milazo. Por kvietigi la malsaton, oni manĝas en tiuj insuloj ĉiujn katojn, hundojn k ne plu laborpovajn ĉevalojn, eĉ se ili estis malsanaj.

Antimilit. Gazetservo (Hago).

RELIEFAJ OKAZINTAĴOJ.

Sendependa manĉuria ŝtato estas proklamita en Mukden la 18-an de febr. La nova registaro havos peran formon inter monarkio k respubliko, ĉar la registara ĉefo estos elektita por vivdaŭro.

Malgraŭ protestnotoj de la *Ligo de Nacioj* Japanio daŭrigas efektivigi sian konker-planon ĉirkaŭ Ŝanĥajo k en nordo. La grandaj potencoj ne riskas aktive interveni je ties aŭ alies favoro, ĉar ili timas same la konsekvencojn de venko de Ĉinio, kiel tiujn de japana venko. La buĉado daŭras.

La balotoj en *Japanio* donis la absolutan plimulton al la konservativa registara partio. La gazetaro komentas, ke tiu venko estas ŝuldata al la financpolitiko de l'registaro, kiu helpis plibonigi la situacion de multaj etburĝoj k kamparanoj. Nur 5 laboristpartianoj estas elektitaj.

Okaze de la 14-a datreveno de la fondo de l'Ruĝa Armeo (23. febr.), la popolkomisaro por militaferoj, Voroŝilof, publikigis en la sovetia gazetaro proklamon pri la pacdeziro de l'sovetia registaro, elstarigante la militdanĝeron en Ekstrema Oriento, kie Japanio preparus sin ataki sovetian teritorion (Vladivostokon).

En la *Irlandaj* balotoj venkis la respublikana opozicio super la registaro. La batalprogramo de l'venkintoj estas „plena nacia sendependeco“. La laboristaj partioj ne povis enregistri iujn progresojn.

La Centra Konsilantaro de l'*sovetiaj lab. sindikatoj* proponas, per starigo de novaj kolektivaj laborkontraktoj, ĝeneralan pliigon de la salajroj en la malpeza k la peza industrio, ĉe samtempa plibonigo de la laborkvalito k pligrandigo de la produktado je 36%.

Unu el la ĉefaj preĝejoj de Leningrado, la katedralo de Kazan, estas fermita k transformita en kontraŭreligian muzeon.

La reveno de senlaboruloj-italoj el eksterlando al Italio preparas seriozajn malfacilojn al la faŝista reĝimo. En 1931 sume revenis el Eŭropo k Ameriko 107 744 laboristoj.

La franca Senato malaprobis la ŝanĝon de balot-metodo proponitan de la parlamenta plimulto el dekstruloj k tiuokaze renversis la registaron, kiu kelkajn tagojn poste restariĝis preskaŭ neŝanĝite, trovante la saman parlamentan plimulton. Lukto pri la potenco inter du preskaŭ samfortaj politikaj grupiĝoj.

Post longa hezitado Hindenburg akceptis kandidatecon por la prezidant-elekto en Germanio kiel *respublikana* kandidato kontraŭ siaj ĝisnunaj ideaj amikoj (Ŝtalkasko) k kontraŭ nacisocialista k komunista kandidatoj.

Hitler akiris per helpo de la naciista Brunsviga registaro la germanan civitanecon, kio ebligas al li esti kandidato ĉe elektoj.

LA NOVA EPOKO

vivos. La unua n-o aperos la 7-an de aprilo. Detaloj sekvos en la venonta n-o.

Malarmado . . .

La patrino levis la okulojn, kiam la malarmada konferenco komenciĝis k murmuretis: „. . . Mi kredas. Mi kredas, ke ĉiuj nacioj el la mondo estas sendintaj siajn reprezentantojn por finfine forpreni de ni la mortminacon. Oni diris al mi, ke nun brilas la sunleviĝo de nova tago, kiu ne plu konos malamon k perfortaĵojn.

„Mi esperas. . . . Mi ne nutris mian filon por fari el li murdiston de alia filo. Ni, patrinoj, ne naskis vivaĵojn por ke tiuj vivoj detruu aliajn vivaĵojn.

„Ĉu tiu konferenco povos malsukcesi, kiu estas benata per la benoj de milionoj da patrinoj?

„Unufoje jam, mi aŭdis la voĉojn el la metalaj buŝoj k spertis, ke ili superfortis la petojn de l'patrinoj. Mi kredas k mi esperas . . . sed pli multe . . . mi timas.“

*

Kiam Henderson estis fininta sian malfermparoladon, Mefistofelo kontente kapjesis k diris: „Bonega parolado, vorto rekte al la koro. Parolado por verki pri ĝi kelkajn centojn da pacismaj gazetartikoloj.

„Kia superbona societo estas ĉi tie. Domaĝe, ke la duono el la reprezentantoj lasis siajn uniformojn hejme, oni rekonas ilin nun tiel malfacile. Parenteze, estas kurioze, kiom da malnovaj konatoj mi renkontis hodiaŭ en Ĝenevo . . .

„Jes, vere kortuŝajn vortojn parolis Onklo Arturo![1] Ni bezonos nun iom da tempo, antaŭ ol ni niaflanke povos rekomenci la atakon . . . fi! mi kontrolu pli bone miajn eldirojn, estante inter tiu ĉi pacema societo. . . Sed, mi celis kompreneble diri: . . . antaŭ ol ni niaflanke povos argumenti pri kelkaj necesaĵoj! Tre domaĝe, ĉar la somero jam alproksimiĝas k la somera sezono estas ĝis nun ankoraŭ la plej konvena militotempo . . . Fulmotondro! denove mi erarparolis. Ni ne volas militon, ni deziras pacon k ĉar ni volas pacon, ni preparas nin al . . . Diable! estas malfacile, kiel oni nuntempe devas kontroli siajn eldirojn. . .“

A. E. (15 700).

[1] T. e. Henderson (*Red.*)

Kelkaj el la artikoloj aperantaj en „S-ulo“ estas nur tial pseŭdonime subskribitaj, ĉar la verkintoj deziras gardi sin kontraŭ persekutoj.

SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

Redakcia adreso: ADOLF WALDMANN, Illerstr. 8, BREMEN, Germanio.

Jen kiel la kristana eklezio ricevas monon.

II.[1]

Alia fakto: Juna knabino antaŭ ne longe mortis en *Karmel* pro frosto k senzorgo. Bona afero por la eklezio. Oni disvastigas la kulton al tiu junulino Terezo Martin. Misiistoj konvertas al tiu kulto indiĝenojn en malproksimaj landoj. Brazilianoj donacas seĝon el oro, pezanta kvardek-kvin kilogramojn. Oni ĝin promenigas dum la tagoj de procesio sur aŭtomobilo. La okazo estas ekspluatata tute moderne. Dum la ritaj ceremonioj oni ne lumigas vaksokandelojn, sed elektrajn lampetojn, kiuj estas des pli lumpovaj, ju pli la donacoj estas grandaj. Girlandoj elektraj ĉirkaŭas la statuon de la sanktulino, aŭtomata aparato ricevas la monerojn de unu franko, kiujn oni en ĝin metas k dum tridek sekundoj la floroj lumas pro dankemo de sankta Terezo.

Sed la piafekto al la „rozo de Lizje (Lisieux)", alia mirindaĵo, postulas, ke oni starigu bazilikon je kosto de okdek milionoj da fr. frankoj. Oni petegas por tio konstante al la riĉuloj k malriĉuloj monon k monon laŭ la ritmo de 40 000 ĝis 50 000 fr. fr. semajne.

Sed tio ne sufiĉas. La sanktulino estu festata en la tuta mondo. La abato *Garibo*, paroĥestro de Leoĵak-Montoban (Leojac-Montauban) en Sudfrancio, petas monoferojn por la starigo de preĝejo je la nomo de Terezo de la Infano-Jesuo; la nova konstruo kostos nur 400 000 fr. fr. Oni akceptas la materialajn donacojn, malnovajn juvelojn; estas promesata al la donacantoj de pli ol mil frankoj, ke ilia nomo estos skribita sur la ŝtonoj de la konstruo k oni preĝas ĉiudimanĉe por la donacintoj. La eklezio scias bonege ekspluati la malvirtojn k vantemon de la homoj.

Laŭ la ĵurnalo „Libera Penso" (Libre Pensée) *kompilis 12 642.*

Proleta „Pasko-festo":

Ne kredo – sed scio!

J. Burger.

Laŭ la Volga-melodio.

„Paskofesto, – jen la tago,
kiam Kristo savis nin!" –
diras pastroj al popolo;
– nepensuloj kredas ĝin.

Kiu diras la fabelon
pri „farita" homa sav'?
Nur trompistoj ĉiam sataj,
eble ankaŭ stulta sklav'.

Ili jam de du jarmiloj
kun la sama fanatik'
igas kredi je saviĝo
en nebula mistifik'.

La rezulto de ĉi kredo:
Luksa viv' por parazit',
sed por produktantaj homoj
vivo en mizer' k ŝvit'.

Tial for la iluziojn,
ke nin savus religi';
ili ĉiuj senescepte
servas nur al reakci'!

Ne la kredo, – sed scienco,
homraci', revoluci'
estas la saviloj, kiuj
gvidas nin al novsoci'!

El la tuta mondo.

Usono.

En Usono oni festas ĉiujare „dankotagon", kies senco estas: Danko al dio pro bonfaroj.

Antaŭ la lastjara dankotago sendis la usonaj liberpensuloj publikan leteron al prezidanto Huver (Hoover), kiu tekstas jene:

„Estimata sinjoro prezidanto!

Tre ĝentile ni proponas, ke la tradicia dankotago en tiu ĉi jaro ne okazu pro jenaj kaŭzoj:

1. Seko. La usona popolo ĵus suferegis pro la plej longedaŭra k plej etendita seko en la historio de nia nacio, kiel konstatis la agrikultura oficejo. Dankdiroj devas esti bazitaj sur faktoj; dankon meritas riĉaj rikoltoj. Pro sunbruligitaj grenkampoj oni ne bezonas danki.

2. Senlaboreco. Milionoj da familioj estas en mizero; ĉar iliaj nutrantoj ne povas trovi laboron. Ili staras antaŭ vintra malsato k sentas kiel mokegon danki pro neokazintaj bonfaroj. Postuli de la kamparanoj, trompitaj je siaj rikoltoj, postuli de la senlaboruloj, trompitaj je siaj salajroj, en tiu ĉi terura tempo ankoraŭ danki al dio: Tio signifas, postuli krom maljustaĵo mokegon!

Ŝajnas al ni pli oportune, anstataŭ dankotago enkonduki „riproĉtagon".

„*Ateisto*", 1. XII. 1931.

Meksikio.

Episkopo Paskual Diaz elvokis la pastraron k la loĝantaron: Rezistu kontraŭ la nova leĝo, laŭ kiu la nombro de la pastroj estu tiom malaltigita, ke por 50 000 homoj nur estu unu pastro. – En Meksiko pro tio la nombro da preĝejoj devas malkreski de 244 al 219.

„*Vezer-gazeto Bremen*", 31. XII. 1931.

Laŭ ordono de la meksikia registaro estas arestitaj pluraj katolikaj pastroj, kiuj pekis kontraŭ la leĝoj rilate al la eklezio. – Lastatempe la kontraŭeco inter ŝtato k eklezio denove akriĝis. Laŭ ordono de la registaro katolikaj instrudiplomoj estas neagnoskitaj.

„*Popolgazeto Bremen*", 2. I. 1932.

Hispanio.

La nova konstitucio nun estas preta. Laŭ oficiala publikigo de la 11. decembro 1931 la teksto maldetale estas jena:

1. Disigo de ŝtato k eklezio.
2. Ŝtata kontrolo super la tuta instruado.
3. Elpelo de la jezuit-ordeno k konfisko de ĝia propraĵo.
4. Neniaj subvencioj aŭ monsubtenoj por la ekleziularo post paso de du jaroj.
5. La parlamento konsistas el unu sola Ĉambro.
6. Universala voĉdonrajto tiel por viroj kiel por virinoj.

„*Ateisto*", 1. I. 1932.

Sovetio.

La „Kontraŭreligia Radio-Universitato" por grand-distanca instruado en Moskvo nun laboras tutplene en la servo de la kontraŭklerika propagando. La sendoj okazas en rusa k ankaŭ en germana lingvoj. – La katolika ĉeforgano „Germania" de la 18. 12. 31., kiu raportas pri tio, timas „detruon al la eŭropa kulturo" k postulas, per ĉiuj rimedoj akre kontraŭbatali la sendstacion. *11 761.*

Germanio.

La nombro da eksiĝoj el la eklezio konstante kreskas. Oni taksas, ke nur en Berlin-centro dum la jaro 1931 eksiĝis 30 000 personoj. Kompare kun la jaro 1930 tio estas pliiĝo je 5000 personoj. „*Liberpensulo*", 16. I. 1932.

Aŭstrio.

Unu el la plej fervoraj protektantoj de la Danubofederacio estas la prelato Sajpel (Seipel), kiu kiel katoliko deziras surtronigi tie Otto v. Habsburg. Samdirekte celas lia subteno al la „Heimwehr"-movado (aŭstriaj faŝistoj), kies disigon li malhelpis. – La socialdemokratoj supozas, ke la „Heimwehr" baldaŭ denove surprizatakos.

„*Fajrero*", 8. I. 1932.

Vatikano.

La administranto de l'Vatikano intervjuis redaktoron de l'„Stampa" (grava itala gazeto) k sciigis lin: La papo instaligas 5000 novajn pastrajn bienojn en Sardinio, Sicilio k Suditalio. – La Tempo (Le Temps), kiu raportas pri tiu intervjuo, konstatas, ke la instalo de unu tia bieno kostas ĉ. 100 000 lirojn. Do la sumo de l'kostoj estas 500 milionoj da liroj (ĉ. 100 milionoj da gmk.). „*Fajrero*", 8. I. 1932.

[1] Vd. ankaŭ la n-on 382.

TRA ESPERANTIO

Publika letero al kompartiaj SAT-anoj.[1]

VI.

Karaj K-doj,

tre bone mi komprenas, ke via situacio en SAT estas iom speciala: la plimulto el viaj sampartianoj ja forlasis nian Asocion k kelke da ili eĉ krude ĝin atakas kiel „kontraŭrevolucian“ organizon. Plie ili klopodas por starigi alian mondorganizon en formo de Internacio. Kaj tamen vi volas resti same fidelaj al via partio kiel al SAT. Ĉu ne estas ia kontraŭdiro en tio? „Ĉu por defendi SAT-on, mi devas ataki mian partion?“ vi demandas . . .

Nu, ĉar vi povis malgraŭ ĉio resti fidelaj SAT-anoj, tio klare montras, ke en via menso forestas partia fanatiko; ke vi povas senpasie aŭskulti diversajn vidpunktojn; vi do konstatis, ke *neniam* ni rilatis malamike al via partio k al Sovetio. Rebatante atakojn de kompartianoj, tio neniel signifas, ke ni agis mallojale al la komunismo. Nur malsinceruloj aŭ supraĵe pensantaj homoj povas identigi iun ajn partianon kun lia partio, identigi CK de SEU kun Sovetio. Estu do tute trankvilaj: estonte kiel estinte SAT restas lojala al la komunismo, same kiel al ĉiuj aliaj tendencoj el la proletaro, kiuj agnoskas la klasbatalon kiel historian fakton k kiel faktoron en la emancipo de l'laboristaro. Kaj se okaze ni mallaŭdas gvidantojn de laboristaj organizoj pro tio, ke ili ignoras esperanton, ni celas nur atingi, ke ili agu pli konsekvence. Ĉiuj ja sin nomas „internaciistoj“, sed ili faras nenion por faciligi la rilatojn inter proletoj el diversaj nacioj . . .

Kaj vi riproĉetas, dirante: „Vi ne devus eksiĝi el la kompartio. . .“ Eble vi pravas; sed oni tamen ne forgesu, ke antaŭ mia eksiĝo ekzistis alia opozicio: anarkistoj k socialistoj riproĉis kun ŝajna — nur ŝajna — pravo, ke SAT estas ia maskita filio de Komintern. Ĉiokaze mi faru konfeson. En la jaro 1924 mi havis espereton, ke tiu Internacio interesiĝos pri la mondlingva problemo. Ĝia tiutempa sekretario, Bela Kun, petis al la Esperantista Komfrakcio raporton pri nia movado. Mi mem verkis ĝin[2] en franca lingvo k havigis al la koncerna Instanco en Moskvo. Kredeble la verkaĵo trafis en iun arĥivejon, kie ĝi nun eble kuŝas ankoraŭ.

Post multaj klopodoj sen aliaj rezultoj ol platonaj diroj de simpatio por nia movado mi firme konvinkiĝis, ke partiaj instancoj, ĉu komunistaj, ĉu socialistaj, neniam serioze okupiĝos pri nia afero, prenante sur sin la propagandon, instruadon k aplikadon de esperanto. Plie, perdinte la esperon, ke la diroj de famuloj kiel Romen Rolan aŭ Barbus povas forte antaŭenpuŝi nian aferon, mi ĉesis klopodi por akiri tian subtenon. Sed almenaŭ rimarku, ke tiutempe neniu el la plej ortodoksaj kompartianoj riproĉis al mi pro tio, ke, ekzemple, nia IIa Kongreso estis sub la patronado de pacisto kiel Romen Rolan k la IIIa sub tiu de alia pacisto, Ajnŝtejn . . .

Nu, pardonu tiun deflankiĝon. Fakto estas, ke neniam ĉe kongresoj de Komintern estis diskutata la mondlingva, la esperanta afero. Sekve la kompartiaj SAT-anoj neniel povas agi tiurilate kontraŭ instrukcioj de sia partio, kiam ili laboras en la esperanta movado.

Estas ja vere, ke Komintern instrukciis al siaj membroj, ke ili akiru la gvidadon en „*ĉiuj*“ laboristaj organizoj, por tie akceptigi la politikan vidpunkton de la partio. Mi ne diskutos, ĉu tia taktiko estas ĝusta aŭ ne; sed mi havas la konvinkon, ke en tiu okazo la respondecaj gvidantoj de Komintern tute ne pensis pri nia mizera esperanta movado. Kiam estis farita tiu decido, ĉeestis neniu esperantisto por starigi la demandon: „ĉu valoras ankaŭ por la SAT-movado la menciita instrukcio?“ Se troviĝus tie saĝa esperantisto por fari tiun demandon, estus facile al li montri, ke nia movado havas tute specialan karakteron, ke ĝi ne estas, k bedaŭrinde ne povas baldaŭ esti „amasmovado“ k sekve, ke la komunistaj SAT-anoj devas tie havi alian sintenon ol en aliaj organizoj.

Sed mi bone komprenas, ke „certaj“ personoj scipovis bonuzi tiun instrukcion k la fakton, ke mi ne plu havas partibileton en la poŝo por efektivigi malnovan, neniam rezignitan planon. Pri tio ne necesas insisti, ĉu ne? Mi volas do nur trankviligi vian konscioncon: restante en SAT, vi per tio neniel agas mallojale al via partio. Cetere la gvidantoj de SAT agus kontraŭstatute, se ili kondutus mallojale al la komunisma tendenco; sed ili volas esti k ili fakte estas lojalaj al ĉiuj tendencoj. Ni scias, ke tia pozicio nia estas nefacile tenebla, ke nia tasko estas tre maldanka en la nuna tempo, kiam ĉie bolas partiecaj pasioj, kiam la batoloj inter la tendencoj estas ardaj k senindulgaj. Pri tio ni plene konscias, sed ni gardas la esperon, ke venos pli oportunaj tempoj; ni almenaŭ havas la firman konvinkon, ke ne ekzistas alia bazo, por ebligi harmonian kunlaboradon inter diversaj tendencoj ol tiu, kiu kuŝas en la SAT-Statuto . . .

Estu do tute certaj, karaj K-doj, ke neniam vi aŭdos de mi la konsilon eksiĝi el via partio, por esti lojala SAT-ano. Tute male, restu tie k defendu okaze la SAT-vidpunkton; vi estu la pioniroj por estonta rekuniĝo de ĉiuj proletaj esperantistoj.

Kun ruĝfrata saluto de via

E. L.

[1] Komparu la n-ojn 376 — 383 de „S-ulo“.

[2] Tiu raporto (kun kelkaj aliigoj) eĉ aperis broŝure kiel eldono de la franca L.E.A.: *La Langue Internationale*, ce que tout militant ouvrier doit connaître de la question. 70 pĝ. Prezo: 3.50 fr. fr., havebla ĉe *Fédération Esperantiste Ouvrière*, 115, Bould. Châteaudun, Montreuil-sous-Bois (Paris).

Al la tuta SAT-anaro.

Nun, ĉar la Protokolaro pri la 11-a SAT-kongreso en Amsterdamo estas preta, ni kuraĝas pri tio informi vin. Vi certe pensis, ke ĝi neniam aperos k jam suspektis la SAT-aparaton aŭ eĉ la SAT-direkcion pro la troa malfruigo en la apero de ĉi tiu raporto.

Se iu(j) el la respondecaj personoj estus kulpa(j), tiam kulpus la subskribintoj, la anoj de l'Organiza Kongresa Komitato. Tiuj komitatanoj ja promesis al la SAT-direkcio prizorgi la eldonon de l'Protokolaro.

Post esploro pri la kostoj (ankaŭ en eksterlando) ni decidis presigi la broŝuron ĉe la presisto, kiu ankaŭ prizorgis la eldonon de la kongreslibro. Tiu presisto same presas la organon de la Nederlanda LEA ktp. Li promesis al ni pretigi la broŝuron je 1. — 15. novembro pasintjare. Post kiam li ricevis 1/2 de la sumo, li ne plu rapidis k ne estis eble, malgraŭ ĉiutagaj vizitoj k minacoj, akiri pli rapidan liveradon.

La LEA-estraro kulpis tiurilate k decidis, ke ĝiaj organo k presaĵoj ne plu estu presataj de tiu fuŝeganta presisto. Tio efektive de nun jam ne plu okazas.

Do tiel statis la afero. La monon la O. K. K. posedas, k ĝi faris ĉion por ke la afero solviĝu. Nek la administracio, nek la direkcio, nek iu ajn el la SAT-aparato malhelpis la ĝustatempan aperon. Nur estis la kaŭzo, ke ni fidis preston, kiu jam dum multaj jaroj liveras al la lab. esp-istoj la necesajn presaĵojn.

Nun la Protokolaro aperis. Ĝi estas sufiĉe interesa, grandlitera, do bone legebla, tre dokumentita. Vi do legu ĝin. Refreŝigu vian memoron.

Por la O. K. K.:

Piet Krijt (14 593, kasisto de O. K. K.)

H. W. Alings (13 025, red. de Lab. Esp-isto. O. K. K.-ano.)

Ni konsentas ĉi-supran deklaron:

Por la Federacio de Lab. Esp-istoj en la regiono de l'nederl. lingvo:

F. Faulhaber. prez. *A. Veen, sekr.*

Komuniko de la Direkcio.

En la lastaj semajnoj deklaris sian eksiĝon el la **Direkcio** *K-doj* **Aber** *(55) k* **M. Desŭa** *(Dessoit) (7767) pro troa okupiteco k forloĝiĝo de Parizo. Ambaŭ tiuokaze perletere esprimis sian fidon al la laboro de la kolegoj el la Direkcio, kun kiuj ili kunlaboris en plena interkonsento dum pluraj jaroj.*

Konforme al la regularo pri funkciado de la Plenum-Komitato, la SAT-anaro en la urbo de l'sidejo de la Direkcio, en Parizo, estis kunvokita k elektis unuanime la 22-an de februaro kiel anstataŭantojn por la du eksiĝantaj direkcianoj K-dojn **Devaren** *(Devarennes) (11 991) k* **Bartelmes** *(1768), kiuj akceptis la elekton.*

La kunvenintaro profitis la okazon, por konfirmi sian plenan fidon al la Direkcio k ĝin peti, ke ĝi daŭrigu gvidi la Asocion laŭ la ĝisnuna, laŭstatuta maniero.

Ni helpu nur la viktimojn de l'klasbatalo!

Laŭ artikoloj 34 k 36 de la Statuto de SAT k laŭ plej simpla solidara sento, ĉiu membro de la Asocio devas ĉiel helpi K-don, kiu petas servon por vojaĝo, dungiĝo, ktp.

Estas kompreneble, ke esp-istoj estas pli gastemaj ol la ordinaraj laboristoj, ĉar ili ŝatas renkonti homon, kiu venas el alia lando k, informiĝante pri la vivo socia en alia flanko de la limo, ili ĝojas akcepti lin hejme k provizi lin per bonaj nutraĵoj k ofte per iom da mono por ebligi, ke li kviete daŭrigu sian veturon al alia loko.

Tion Ljonaj (Lyon-aj) SAT-anoj ĉiam sentis k ili faris la tutan eblon por eviti al vizitantoj malagrablan restadon en la urbo. Jam de 10 jaroj pasis certe pli ol 100 K-doj, kiuj estis kiel eble plej fratece akceptitaj.

Ni volus fari same, eĉ ni volus inviti eksterlandajn samcelanojn veni en Ljonon, sed la nunaj ekonomiaj cirkonstancoj devigas nin atentigi la vojaĝemajn K-dojn.

Francio, ĝis lastaj monatoj, staris ekster la senlaboreca krizo; pli malpli bone, laboristoj povis vivi kun sufiĉe altaj salajroj. Dum aliaj landoj suferis pro senlaboreco, Francio vigligis sian produktadon k industriistoj ne atentis, ke la aĉetopovo de la laboristoj malpliiĝis. Fabrikoj fermiĝis; bankoj k grandaj entreprenoj bankrotis; laborejoj privilegiaj nur laboras 2—3 tagojn dum la semajno. Se la oficiala statistiko montris nur 30—35 000 senlaborulojn en 1930, la ministerio de laboro devis sciigi, fine de 1931, ke la nombro da asekuritaj senlaboruloj atingis 250 000; plie la ministro konsentis, ke la ĝusta nombro da senlaboruloj superas *milionon* k la nombro da partaj senlaboruloj (t.e. laboristoj, kiuj laboras nur 20—25 horojn semajne) atingas *du milionojn.*

El ĉiuj partoj de Francio, Ljono k Sud-orienta regiono estas plej severe tuŝataj de la krizo. Ne nur la silka industrio, sed la metalurgia, la minista, la lignaĵista k aliaj fakoj estas pli k pli tuŝataj k oni povas diri, ke la laborista klaso nun suferas en mizero, ĉar la subteno de la urboj estas ridinde nesufiĉa. *En la esp-ista medio svarmas la senlaboruloj, kiuj ne povas pagi sian kotizon al loka Esp. Lab. Grupo k al SAT.*

Spite tre granda deziro helpi K-dojn trapasantaj la urbon, Ljonaj SAT-anoj devas averti vojaĝemulojn, ke ili ne trovos tie la atenditan helpon. Kiam ni ĝuis pli bonajn cirkonstancojn, ni ne hezitis preni el la monujo la necesan rimedon por gastigi la alvenantojn k por meti en ilian poŝon kelkajn dekojn da frankoj. Hodiaŭ, ĉar ni troviĝas en la sama situacio, kiel niaj vizitantoj (kiuj iras de urbo al urbo, ĉar en ilia lando ia okupo estas netrovebla), ni estas devigataj decidi, ke ni nur atentos pri la K-doj, kiuj foriris de sia lando pro tre grava motivo. Ekzemple, politika elmigrinto estas ĉiel subteninda k por li ni prenos el nia malgranda havaĵo por eviti, ke li malsatu k estu kaptata de la polico. Tiaj K-doj povas esti laboristoj, kiuj forkuris faŝismon aŭ landon, kie ilia vivo estas en danĝero pro batalo kontraŭ policistoj. Ni memoras, ke en 1922—25 ni helpis K-dojn, kiuj estis en tiaj kondiĉoj.

Tro ofte vizitis nin K-doj, kiuj nur emis aventurojn k vojaĝojn; ni ne bedaŭras, sed ni opinias, ke veraj klasbatalantoj ja meritas unue nian solidaron. Cetere, en la nuna epoko, kiam la krizo fariĝas tutmonda, kiam kapitalista sistemo tremas ĉe sia bazo, necesas, ke ĉiuj laboristoj agu por fruigi la falon de l'burĝa socio. Ne vagante, sed agitante en siaj revoluciemaj organizoj, senlaboruloj penos por ĉesigi sian suferon. Kaj se el la nuna krizo povus rezulti la starigo de nova socio, ni fierus k senhezite invitus K-dojn veni en nian urbon, kie ili trovus ĉion necesan.

Esperantista Laborista Grupo de Ljono (Lyon) k SAT-Rondo.

EN NIA MOVADO

KRONIKO

Britio. Laŭ klopodoj de K-do *Stej* al la regiona (suda) konferenco de Sendependa Lab. Partio (ILP) estas prezentita propono de la Bournemouth-a sekcio de ILP, kiu rekomendas uzi internaciskale esp-on en la organizaj rilatoj k agiti por ĝia instruado en elementaj lernejoj. Ĝi estas presita sur la tagordo de l'nomita k ankaŭ de la Nacia konferenco de ILP. (*2978.*) — **Germanio.** *Görlitz.* Vintra kurso kun 20 p. Fako ĉe radio-ekspozicio. La sindikatoj ignoras nian agadon k ne volas rilati kun ni. (*5320.*) *Weisswasser.* Ekzistas du grupoj, kiuj organizis kursojn. *Lauban.* 3 kursoj, unu ĉe komunistoj (ĉ. 30 p.), unu ĉe socialistaj unuiĝoj (20 p.); unu ĉe „Ruĝaj Falkoj" (soc. junuloj) kun ĉ. 20 p. *Marklissa.* K-do 5320 gvidas kurson ĉe Laborista Gimnastika Unuiĝo. *Schönberg.* 12 kursanoj en senpaga lerneja ĉambro. La kurso estas aranĝita helpe de loka lab. gimnastika unuiĝo. *Magdeburg.* K-do Lerhner el Lajpcig paroladis la 31. januaro ĉi tie pri la celoj de SAT. Ĉiuj lokaj esp-istoj estis invititaj. Ankaŭ venis SAT-anoj el la ĉirkaŭa regiono. Ĉiuj estis kontentaj pri la al- k el-parolado de K-do L. Ni esperas nun havi pli grandan sukceson ol antaŭe, ĉar, kvankam ni multe elspezis por flugfolioj, afiŝoj ktp., la rezultoj estis nur malgrandaj, tial ke la loĝantoj ĉi tie ne emas lerni esp-on. Je la 2. marto okazis la malfermo de nia nova hejmo (Grünearmstr. 14), en kiu estas sufiĉe da loko por multaj esp-istoj, kiuj espereble plenigos ĝin en estonta tempo. (O. Görisch, 17 424). — **Svedio.** *Eksjö.* Kurso kun 20 p. komenciĝis dum jan. en la popoldomo. *Eskilstuna.* Ekzistas nun en la regiono 12 studrondoj, nome 4 daŭrigaj kursoj de ABF k 1 por komencantoj. 1 komenca kurso en Rekrane, 1 komenca k 1 daŭriga en Torshälla, same tiaj en Skogstorp. Koresp. kurso en Hällybrunn. *Hälsingborg.* 9 kursoj kun ĉ. 180 p. (inter ili multaj dungitoj en komerco). Regula klubgazeto „Modestulo". *Stokholmo.* Jarkunveno de l'lab. esp. klubo okazis la 15-an de jan. Aprobataj estis la estrar-raportoj. La klubo enskribis sian centan membron en la jarkunveno. (Laŭ *Sveda Lab. Esp.*)

Sportuloj! Notu!

. . . Ke la jara Spartakiado organizata de *Sportfederacio de Laboro* (francia filio de *Ruĝa Sportinternacio*) okazos en Ljono (Lyon) de la 14. ĝis 17. julio 1932.

Dum tiuj sportaj renkontiĝoj okazos maĉoj de piedpilko, piedkuroj, biciklet- k motociklo-kuroj, ktp inter plej bonaj sportuloj de laboristaj kluboj de Francio, Belgio k Svisio. Povas partopreni tiun manifestacion ne nur la membroj de Ruĝa Sport-Internacio, sed ankaŭ la anoj de Lucerna Internacio. El tiu granda renkontiĝo, kiun partoprenos certe pli ol mil sportuloj, rezultos la elekto de la delegitaro al tutmonda Spartakiado en Moskvo (1933).

Esp-istoj, disvastigu tiun informon en via rondo, en organizoj k gazetoj de via urbo. Petu sciigojn al: *Fédération sportive du travail,* Salle de l'Europe, 320, cours Lafayette, *Lyon (Francio).*

Membro de subtena komitato de la Spartakiado, SAT-ano 132.

La protokolaro pri la XI-a SAT-Kongreso en Amsterdamo.

112-paĝa interesega dokumento, fine aperis.

Ni memorigas, ke ĉiuj SAT-anoj k **„S-ulo"-abonantoj,** kiuj sendis la monon por la afranko, (t. e. 0.15 mk. g. aŭ egalvaloro) al la Administracio, havas rajton ricevi la broŝuron por si

senpage.

Pliajn ekzemplerojn oni mendu varbcele; por ili ni fiksis la nuran memkostan prezon, kiu estas *0.30 mk. g. aŭ 1.50 fr. fr., 0.20 guld., 0.10 cendoj, 3,6 pencoj aŭ egalvaloro.* Oni aldonu 50 pocentojn por la afranko.

Nederlandanoj mendu ĉe K-do *J. Minke,* Veeteeltstr. 156, *Amsterdam-W.*

RADIO-PROGRAMO:

10. marto:
22.25–22.35, Breslaŭ, Gleiwitz: 10 min esp. por lab-istoj.

11. marto:
22.00–22.30 Minsk, 700 m, informoj (*samhore la 14. 3., 17. 3.)*

12. marto:
22.05–22.30, Leningrad, 1000 m – informoj.

13. marto:
9.10– 9.35, Hilversum, 1875 m – kurso *(samhore la 20. 3.).*
10.15–10.30, Helsingborg, 229 m – informoj.

15. marto:
20.00–20.10, Tallinn, Tartu: – informoj.

18. marto:
19.00–19.30, Moskvo, 425 aŭ 1481 m – informoj (*dube*, ĉu la dissendo okazas).

MEMORNOTO

Represis el „S-ulo":

Industrial Worker, Chicago, 26. 1., mizervintro en Svedio (378/79); *Marine Worker*, Nov-Jorko, jan., protestu kontraŭ hisp. reg. (372/73); *The Open Forum*, Los Angeles, 9. 1., Hist. pri mia morto (374/75); *La Okcidentulo*, Lisbono, kiom kostas al ni la milito (370/71); *The Advance*, Carlisle, senlaborula gazeto, 29. 1. pri vivkond. en Svedio k Estonio (resumite); *Rahva Sona*, Tallinn, 3. 2., Ajnŝtejn pri paco (363), militrezisto (370/71), mizervintro (378-379), poezio malaperas (380), 28. 1., esp. en Nederl. (380).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Signalen, Stokh., 28. 1., 4., 2., 18. 2.; *Der Volkslehrer*, Harburg, 31. 1.; *The Labour Woman*, Lond., feb. (rubr.); *ITF-Bulteno*, Amst., febr. (rubr.); *Le Populaire*, Paris, 15. 2.; *The Los Angeles Record*, 15. 1.

Pri 12. SAT-Kongreso notis:

Rahva Sona, Tallinn, 29. 1.

Peresper. materialon enpresis:

Rahva Sona, Tallinn; *Norrskensflamman*, Lulea; *Norrlandsfolket*, Kiruna; *Norrlandska Socialdemokraten*, Lulea.

KORESPONDADO

Unu enpreso, simpla trilinia anonceto kostas 0,80 mk. g., ĉiu plia linio 0,50 mk. g. — Grandaj anoncoj kun kadro: po kv. cm. kostas 0,20 mk. g.

ĈEĤOSLOVAKIO

2 K-doj koresp. kĉl, pri socipolitiko k vivreformo. Adr.: V. Kouril, *Tluĉna 89*, k V. Maŝek, *Tluĉna 136 ap. Plzen.*

FRANCIO

2 junuloj (23 j.) invitas gejunulojn pasigi la paskajn tagojn en sia ligna domo. Loĝo, 3 manĝoj kostas 15 fr. tage. Ekskursoj. Adr.: Internacia Hejmo Esperantista, *Aspremont* (A.M.) ap. Nice.

GERMANIO

Socialistaj gejunuloj dez. koresp. kĉl. Gek-doj. Skribu multnombre, ni certe respondos! Adr.: K-do Hub. Cremer, Immengarten 40, *Hildesheim.*

K-do Walter Schröter, *Lomnitz/Rsgb.*, Nr. 162, dez. koresp-adon en angla, franca k esp. lingvoj, pri ĉ. temoj, kĉl, PI, PM. Certe resp.

K-do H. Kreusel, Kl. R. W. Str. 25/III., *Annaberg/Sa.*, L, PK, PI, bfl., krom Germanio.

4 K-doj koresp. pref. kun gelaboristoj, kiuj laboras en linoleumfabrikoj. Skribu al: K-do J. Koomen, *Assendelft.*

HISPANIO

Kontraŭ PM de Rusio k Litovio mi sendos PK, PI, librojn, ilustritajn gazetojn ktp. Adr.: Amadeo Ribera, Paseo del Triumfo 82, pral., *Barcelona.*

Juna hispano koresp. kun Gek-doj en franca lingvo, por pliperfektigi sin, PI. Serioza garantio pri resp. Adr.: Julian Aguilas, Guillem de Castro 38, *Valencia.*

Ĉiu, kiu vendas al mi 30 aŭ 50 PM el sia lando ricevas la saman kvanton el Hispanio. Resp. formale garantiata! Adr.: Rafael Palomares, Pi y Margall 54, *Valencia.*

K-doj Petro k Johano Sanllehi, Sallarés 33. *Sabadell*, dez. ŝakludi per vidaĵkartoj, kĉl. Certe resp.

NEDERLANDO

18 geknaboj (10–14 j.) dez. koresp. kĉl. infanoj. Skribu al: K-dino G. van Essen, *Hem* (N. H.).

Grupo da finstudintoj koresp. kun tutmondaj Gek-doj, L, PK. Adr.: J. Massaar, Meidoornstr. 45, Leiden.

SOVETIO

K-do J. M. Majorenko, Insitucka 4/41, *Kiev, I.*, kĉl.

SVEDIO

Helpu nin! – El la landoj de l' 5 mondpartoj nia klubo atendas L, PK, PI, ktp. por letervespero, arangôta la 25-an de aprilo 1932. Respondos certe. Adreso: Esperanta Klubo, *Slöinge.*

K-do Nils Rychtar, Värmlandsgatan 5, *Karlstad*, kĉl. Gek-doj, pri ĉ. temoj, pref. kun sukeraĵisto.

Gekursanoj-klubanoj koresp. kĉl. Ni petas eksterl. Gek-dojn sendu multnombre L, PK, PI. Nepre resp. Adr.: „Laborista Esperanto-Klubo", poŝtkesto 205, *Karlsborg.*

16 lernantoj komunistaj dez. koresp., L, PK, PI, kĉl. Skribu al K-do Nils Holmberg, *Djursholm 3.*

K-do Tore Andersson, 1-a Länggat. 6, *Göteborg*, interŝ. PI, PM, ktp. Resp. garantiata.

USONO

K-do Alton H. Rogers, Box 672, *Marsfield, Oregon*, kcl. Gek-doj, pri ĉ. temoj. Resp. ĉiam garantiata.

Socialista Gazetara Informejo Esperantista en Warszawa interŝ. artikolojn, informojn, k fotojn pri politika k socia vivo. Materialo de ni ricevita estos utiligata por socialista gazetaro nialanda por montri praktikan valoron de esp. por proletaro. Resp. al ĉiu garant. *Poŝta adreso:* Edward Bugajski, *Warszawa*, Ordynacka 6 m. 8, Polio.

Letervesperon

arangôs klubo „La Internacia Volo" la 6-an de aprilo 1932.

Skribu multnombre! Respondo garantiata!

Adreso: Martin Johansson, Tulegatan 37. *Sundbyberg.* (Svedio).

Alvoko por Korespondado.

Karaj Gek-doj! Ni, laboristoj el la plej granda Kieva maŝinkonstrua fabriko je la nomo de „Bolŝevik", volas korespondi kun eksterlandaj K-doj. Nia korespondado estas la plej bona rimedo por interŝanĝi niajn sperton k vivatingaĵojn. Nia koresp-ado, interŝanĝo de ĵurnaloj, gazetoj, ilustritaj kartoj estos tre interesa k memkompreneble facila por ni.

Ni esperas, ke la Gek-doj detale k klare rakontos al ni pri sia vivo k laboro. Ni niaflanke tre volonte rakontos al vi pri nia vivo, konstruado k kvinjarplano en nia lando. Ja plenumo k atingoj de la kvinjarplano ne estas nur la tasko de sov. proletoj, sed tia de l' ĉiulandaj proletoj. Do finante ĉi tiun mallongan leteron, ni esperas vian baldaŭan respondon. Kun komunistaj k proletaj salutoj en la nomo de la laboristoj de la fabriko „Bolŝevik". *Kovalenko.*

P. S. Skribu al ni „KIFINTERN", USSR, Moskvo 9, poŝtkesto 321 (por Kovalenko).

Samideanoj tutmondaj!

2 j. K-doj bicikle travojaĝos la vastan mondon, emas amikiĝi aŭ letere interrilatiĝi kun multnombraj ges-oj. Bv. *tuj* skribi al: *H. Ebersbach, Leipzig C 1,* Waldstr. 42 (Germ.).

Nove fondita germanlingva monata gazeto

Sozial-Pazifist

serĉas en ĉiuj lokoj personojn, kiuj volas vendi la gazeton. Uzu la bonan okazon por helpi la movadon k perlabori monon!

Skribu tuj al la distriktredakcio d-ro S. Ziegler, Monningstr. 48, Mülheim (Ruhr)-Speldorf (Germanio).

Postulu senkostan provnumeron!

ENHAVO

	pâgo
La Ĉin-Japana konflikto	131–132
La tago de la Pariza komuno	132–133
Malsatego furiozas en la norda parto de Japanio	133
„Leĝo k ordo" en Kalifornio	134
Striko en Nederlando	134
Pri la bankproletaro en Germanio	135
La klasbatalo tra la mondo	136
Reliefaj okazintaĵoj	136
Malarmado	136
Sennaciula liberpensula paĝo	137
Tra Esperantio	138–140

K-doj el la germanlingvaj regionoj-atentu!

La Socialista Esperanto-Asocio (SEA) por la germanlingvaj regionoj eldonis la broŝuron de K-do E. Lanti

LA LABORISTA ESPERANTISMO

en germana lingvo. – Aĉetu tuj! Prezo: 0,30 gm. Grupoj ricevas 10% da rabato! Por ĉiuj mendoj, kiuj alvenos en februaro, ni donas 20% da rabato ĉe tuja pago. Vendu ĉi tiun gravan verketon inter la neesperantista laboristaro. Mendu tuj ĉe la SEA-librejo, FRANKFURT a. M. 21, Heerstrasse 85.

Presejo, Oscar Wettig, Gelnhausen (Germanio)

ANEKDOTOJ.

En la lando de Horti.

Homo estis dronanta en la Danubo k helpkriis. Vane, neniu venis por lin helpi. Subite, frapite de inspiro, li ekkriis per ĉiuj siaj fortoj:

– Pereu Horti!!!

Tuj la bordkrutaĵoj kovriĝas per homoj, aŭtomobil-boatoj forlasas la bordon k la fortikaj brakoj de l'hungaraj policanoj elŝiras la malfeliĉulon el certa morto.

Ursa fablo.

Ermito, loĝanta en arbaro, amikiĝis kun urso. Iun tagon ili kune migris tra la kampoj. La tago estis varmega, k la ermito laciĝis.

„Kara amiko mia," diris la urso, „mi vidas, ke vi estas laca. Ni haltu sub tiu arbo k en ĝia ombro vi ripozu iomete. Kaj mi apudsidos k gardos vian dormon."

Tiel ili faris. Kaj kiam la ermito estis ekdorminta, la urso eksidis ĉe lia flanko k per filika branĉo ventumis lin.

Jen alflugis muŝo k eksidis sur la nazon de la dormanto. Ĉagrene la urso forigis ĝin per sia branĉo. Sed tuj ĝi revenis, k kolere la urso ĝin ree forpelis. Sed persiste – tiaj estas la muŝoj – ĝi revenis trian fojon. Tiam la urso ne plu povis reteni sin.

„Mizera bestaĉo!" ĝi kriis. „Ĉu vi ne ĉesos ĝeni mian dormantan amikon?" Kaj ĝi ekprenis ŝtonon k per terura frapego frakasis la muŝon, sidantan sur la nazo de l'ermito k ĉi-kune la kapon de sia amiko.

Memoru: Malsaĝa amiko estas danĝera malamiko. *Komunikis 15 195.*

POR NIA DISTRO:

Solvo el la antaŭa n-o:

H	A	R	M	O	N	I		T	E	N	D	E	W	C
I		E	E		A			A		E	I			I
A		I	G		C			Ŭ		P	A			V
C	E	R	A	M	I	K		G	E	R	M	A	N	I
I			F			I					A	B	A	T
N			O			R					N			A
T	R	A	N	Ĉ	I	L		M	A	S	T	R	I	N
P	R	A	K	T	I	K		H	I	P	O	T	E	K
A			O					A			P			V
R	U	B	L					N			E			A
A	N	O	R	M	A	L		S	A	T	R	O	N	D
D			I	A		I			R		A	Z		R
I			N	N		T			M		C	O		A
Z	I	N	G	I	B	R		M	E	L	I	N	I	T

Liter-enigmo.

Al ĉiu cifero respondas unu litero. Al la vortoj ne estas aldonita la substantiva finaĵo, kiu apartenas al ĉiu vorto (escepte tiu sur la 6-a linio). Se oni legas la unuajn literojn de ĉiu vico de supre malsupren, oni ricevas vorton, kiu hodiaŭ estas en la buŝo de multaj homoj.

1 2 4 10 2 5 6 4 Azia reĝo, kiu kontraŭbatalis la romanojn.
2 10 3 6 7 5 „Libera" eŭropa ŝtato.
3 2 4 6 7 2 Longa preĝa ceremonio
2 4 6 3 2 Ankoraŭ eŭropa lando.
4 6 7 5 9 1 Bicikleto por du personoj.
5 6 7 4 5 Mezepoka poeto.
6 5 6 1 Laŭlegende la unua homo.
7 6 4 10 2 Entenata en la salo.
8 6 10 5 9 7 Per vegetaĵoj surplantita
9 3 5 11 10 6 5 Fantazia lando [loko. plena de riĉoj k abundo.
10 9 8 2 5 Filo de monarko.
11 7 4 6 10 2 Granda nord-amerika lago.

Humoro

Inter pastroj.

Al vilaĝo venis nova help-pastro, kiu antaŭ sia unua dimanĉa diservo petas konsilon al la maljuna ĉefpastro koncerne la lokan diservo-kutimon.

Jena dialogo okazas inter la du „piuloj":

La help-pastro: Mi volas scii pri la diservo-reguloj ĉi-lokaj, precipe kiom da tempo mi devas surgenue kuŝi en pia preĝado antaŭ la altaro, faronte mian predikon?

La ĉefpastro: Ĉi-loke ni kutimas kalkuli ĝis dek; sed en kelkaj aliaj preĝejoj oni eĉ kalkulas ĝis dudek ... tamen tio ŝajnas al mi granda hipokrito. *12 439.*

Diversaj koloroj.

Oni diras, ke la homo fariĝas *blanka* pro timo, *flava* pro envio, *verda* pro angoro, *blua* pro malvarmo, *ruĝa* pro kolero k *griza* pro maljuno.

Singardo k malkuraĝo.

Instruisto: Nu, Marko, ĉu ci povas diri al mi la diferencon inter *singardo* k *malkuraĝo?*

Marko: Jes, se ni mem angoras, tio estas *singardo*, sed se iuj aliaj timas, tio estas *malkuraĝo.* *H. B.*

Ili ne estas plu.

Pastro rakontis pri la sanktaj sakramentoj. „La sekvontan semajnon mi demandos pri ĉi tio," li aldonis.

Montriĝis, ke la infanoj, escepte unu el ili. forgesis pri ĉio.

„Nu, Viĉjo," ĝoje diris la pastro, „rakontu al ni pri la sanktaj sakramentoj."

„Ili ne estas plu, sinjoro pastro," diris Viĉjo.

„Kion vi diras, Viĉjo, ili ne estas plu??"

„Ne, sinjoro pastro," respondis la knabo, „Hieraŭ vespere oni donis la lastajn al la ŝuisto ..." *Trad. 14 942.*

Ĉe la ĉapelistino.

Klientino: Strange estas, ke ĉe vi mi trovas eĉ ne unu konvenan ĉapelon!

Vendistino: Tio estas, ĉar ni havas nur ege modernajn ĉapelojn, k via kapo estas jam tute ekstermoda.

Laŭ Sisterona Esperantisto.

La Lernanto

REDAKTEJO: 14, av. de Corbéra, Paris XII-e :: ADMINISTREJO: Kolmstrato 1, Leipzig O 27

ESTIS IAM . . .

Estis iam viro, kiu havis du azenojn. Ambaŭ devis migri ĉiutage dufoje al la muelejo por alporti farunon. Tio estis ilia laboro, k por tio ili ricevis sian furaĝon. Bonan furaĝon. Ili sufiĉe bone fartis; k nun ili opiniis, ke ilia mastro tre ĝojus, se li havus ankoraŭ malgrandan azenon. Furaĝo ja ne mankis. Kaj post kelka tempo naskiĝis azenido. La mastro ege ĝojis pri tiu amuza besteto. Kiam la maljunaj azenoj iris al la muelejo, saltis flanke de ili la vigla ideto. Ĝi bone kreskis k prosperis por la ĝojo de siaj gepatroj k de la mastro.



Iutage venis najbaro al la viro k petis lin, ankaŭ por li kunporti la furaĝon, dirante, ke li ja posedas tri azenojn. La viro konsentis; k jen la rezulto! La juna azeno ankaŭ portis du sakojn. Sekve la mastro opiniis, ke li nun povus vendi unu maljunan azenon. Du azenoj sufiĉus. La tria nur manĝus, sed ne laborus. Li vendis la plej maljunan.

Post kelka tempo denove necesiĝis kunporti la farunon por la najbaro. La viro ŝarĝis per tri sakoj ĉiun azenon. La maljuna rifuzis porti pli k deĵetis; la juna portis, ĉar ĝi volis montri sian forton. Ĉar la maljuna ĉiam denove deĵetis, la viro ŝarĝis la junan azenon ankoraŭ per unu sako, ĉar la faruno devis esti transportata hejmen. Tiel okazis, ke la juna azeno portis hejmen kvar sakojn.

„Ĉar vi estas tiel obstina, mi vendos vin!“ diris la viro al la maljuna azeno. „La juna portas sammulte, kiom vi ambaŭ estis portantaj. Sed ĝi manĝas nur unufoje. Se mi vendas vin, mi nur povas ŝpari, k mia riĉaĵo plimultiĝos.“

La viro vendis la duan azenon k ŝarĝis la junan per la tuta laboro. Al tiu la ŝarĝo kelkfoje ja fariĝis tre peniga, sed ĝi estis juna k ricevis bonan furaĝon. Ĝis . . .

Vespere sidis la viro en sia ĉambro. Li nombris sian monon k ankaŭ prikalkulis, kiom do manĝis la azeno. Li diris al sia edzino: „Mi provos, ĉu mi ne povos ŝpari iom da furaĝo. Kion mi ŝparos, tio estos mia profito.“ Kiel dirite, tiel farite.

Komence la azeno rigardis malkontente. Sed por ne kolerigi sian mastron ĝi sintenis trankvila k daŭrigis labori. La azenon tio ne multe ĝenis, k la viro sidis hejme k ruze ridis. Semajne li nun ŝparis la furaĝon por unu tago, ĉar li donis al la azeno ĉiutage plenmanon malpli da furaĝo.

Denove sidis la viro en la ĉambro k kalkulis k nombris sian monon. Ho, tio estis profitdona. Se li donus al la azeno ankoraŭ plenmanon malpli? „Jes, tio estus ideo. Tion mi provos.“

La azeno ribelis pro tiu ĉi depreno

k ne plu volis labori. Koleriĝinte pro la striko de sia ekspluatato la mastro batis ĝin. Ankaŭ li minacis vendi ĝin. „Aliaj azenoj estas abundaj, kiuj ĝojos labori ĉe mi. Vi ankoraŭ tro bone fartas.“ Ĉar la azeno ne volis plene kolerigi sian mastron, ĝi daŭrigis la laboron. De tago al tago ĝi plimalgrasiĝis. Sed la viro ne vidis tion. Li nur ĉiam kalkulis, kiom li profitis donante al sia azeno ĉiusemajne furaĝon nur por kvar tagoj. Malgraŭ tio la mizerulo plenumis la saman laboron, kiun faris antaŭe du el ĝia speco.

Iutage, kiam la viro volis preni sian azenon el la stalo, la besto estis mortinta. „Domaĝe,“ diris la viro, „ĝi jam bone alkutimiĝis! Nu, ekzistas ja ankoraŭ pli multe da azenoj!“

La viro jam delonge mortis, sed liaj idoj ankoraŭ vivas hodiaŭ. Ili aplikas tute la saman metodon kiel la mortinto; k ĉiuj azenoj, kiuj toleras ĝin, suferas ankaŭ la saman sorton.

Joli.

El germana metallaborista gazeto trad. Ŝnurbuŝ (1413).

GRAVA INTERNACIA ENKETO pri senlaboreco k infanoj.

Al niaj Gek-detoj inter la tutmonda infanaro:

En ĉiuj eŭropaj landoj instaliĝis perfide la senlaboreco kun sia akompanantaro de abomenaj malbonsortoj k mizeregoj. En la kamparo kiel en la urboj, ĉie estas la samaj neŝatindaj rezultoj.

Oni unue malpliigis la salajrojn, poste maldungis la plej grandan parton el la laboristoj, viaj gepatroj, gefratoj eble. La aliaj, en la fabrikoj k diversaj laborejoj, laboras nun nur 3 tagojn semajne, eĉ nur du aŭ unu tago(j)n.

En la kamparo, oni renkontas preskaŭ la samajn malfacilaĵojn, proporcie, por viv-ekzisto. En Francio neniam okazis tiel terura senlaboreco.

K-detoj el ĉiuj landoj, skribu multnombre! Respondu detale nian demandilon. Ni enpresigos viajn skribaĵojn en nia gazeteto „La Garbo.“

A. – Por la infanoj de urbanaj laboristoj.

Ĉu viaj gepatroj estas senlaboraj? Ĉu kontraŭe ili laboras la tutan tagon? Kiom da salajro ili ricevas ĉiusemajne? Ĉu ili ĉagreniĝas? Pro kio?

Ĉu viaj vivkondiĉoj estas pli malfacilaj en la nuna situacio?

Rakontu pri via nuna familia vivo k elmontru la malfacilojn, kiujn renkontas viaj gepatroj por nutri vin.

Kion diras viaj gepatroj? Rilate al la ĝisnuna organizado de la homaro, kiel vi opinias, ke oni malaperigos k forigos la senlaborecon?

B. - Por la idoj de vilaĝanoj, terkulturistoj.

Ĉu viaj gepatroj nun malpli gajnas ol dum la antaŭaj jaroj? Donu koncernajn produktoprezojn

a) el la lastaj tri jaroj,
b) el la nuna tempo.

Ĉu vi jam suferis hejme pro malbona vendado de l'produktoj?

Rakontu pri ĉiutagaj vivkondiĉoj k elmontru la rezultojn sur vian infanvivon, vian laboron, vian nutradon.

Kion diras viaj gepatroj? Kion ili pensas pri tio? Kiel vi persone opinias, ke oni povus ĉesigi tian mizeregon k malaperigi tiajn egajn domaĝojn, kiujn ĝi alkondukas?

Vi eble ne estis k ne estas atingita iel de senlaboreco. Tiam rigardu en vian proksimon k priskribu ion pri malfeliĉa familio de via ĉirkaŭo.

Se ne estas senlaboruloj en via loko, provu klarigi tion.

Kompreneble, tiu demandilo estos por vi, infanoj, nur instiga ideo pri la diversaj temoj, kiujn eble vi pripensos. Estus treege dezirinde, ke vi bone nin informu.

Vi ne estas devigataj respondi per nura nea aŭ jesa sciigo al la demandoj. Prenu folion k skribu iun longan rakonton. Ni tre petas sinceregajn redaktaĵojn. Sendu multnombrajn tekstojn: rekompence ni sendos libretojn, kiuj enhavas belajn rakontojn pri la infanvivo en Francio.

Redakcio de „La Garbo“, interligilo de la infanaro.

Direktu viajn leterojn k aliajn sendaĵojn al nia adreso: K-do *H. Bourguignon*, instruisto, ĝenerala gvidanto de la Internacia Interlerneja Korespondado, en *Saint-Maximin* (Var), Francio.

FOR LA ALTAROJN!

H. Weinhengst.

For la altarojn, kiujn sklaviĝemo
De homa stult' konstruis al la di',
Molońo kun eterna manĝegemo
Kreita de humila fantazi'!

Disrompu la ikonojn k dibildojn,
Hontigajn signojn de la malraci'!
Forŝiru ĉie la reklamajn ŝildojn
De ĉiuspeca firmo „Eklezi'“!

Finfine fermu templojn k preĝejojn!
Eluzu ilin por racia cel'!
Transformu la mallumajn mistikejojn
Je klerigejoj kun suntaga hel'!

For la altarojn! En jarcent' dudeka
Ne estas spaco plu por religi'!
Esploru ĉion la scienco seka,
La blindan kredon anstataŭu sci'!

LINGVAJ NOTOJ.

Antaŭ kelka tempo oni demandis sin en la Pariza laborista esp. grupo, ĉu esperanto ne iun tagon disfalos en dialektojn. Estis kelkaj kontraŭdiraj opinioj, ne ĉiuj estis optimistaj

tiurilate. Tamen la konkludo estis, ke tiu danĝero de la disdialektiĝo estas evitebla, se ni daŭre k fervore uzadas la lingvon en *internacia skalo.* Garantio kontraŭ la disfalo en dialektojn estas la pli k pli disvastiĝantaj interrilatoj inter la homoj de l'tuta mondo dank' al la moderna tekniko (radio, tele-vidado[1], ktp). Tiel oni povas atenti pri tio, ke la por la unueco de la lingvo necesaj kondiĉoj estu plenumataj konstante, nome 1. Unueco en la prononcado (kontrolebla per internaciaj kongresoj, radio, gramofono k.c.); 2. Unueco en la skriba lingvo k tiucele rigora obeo al la ĝeneralaj reguloj sur la bazo de l'Fundamento (evito de privata, arbitra enkonduko de neologismoj;) 3. Evito de naciaj idiotismoj en skribo k parolo. Recenzistoj en esperantaj gazetoj devas senkompate kondamni verkojn, en kiuj estas fuŝata k kripligata la lingvo.

Tia danĝero pri disfalo tamen neniam, eĉ ĉe daŭra k internaciskala uzado, devus esti malatentata; ni supozu, ke esperanto *ne* egalpaŝe kun la teknikaj progresoj disvolviĝos (kvankam nia espero estas, ke ĝi marŝos egalpaŝe k sin trudos al la moderna vivo). Eksteraj malhelpoj, subpremo fare de registaroj ktp. povus efiki, ke esperanto ankoraŭ longe estos uzata nur malgrand-skale, malgraŭ la fakto, ke la teknika progreso pli k pli rapide malvastigas la terspacon k ebligas senperajn tutmondajn interrilatojn. En tiu okazo la dezirata internacia kontrolado de l' lingvo-uzado ankaŭ restus ĉiam nesufiĉa k sekve la nomita danĝero ekzistus. —

Multe helpas al unueca uzado de esperanto la evitado de *naciaj idiotismoj.* Ni citis tiajn en la lasta n-ro sub ĉi tiu rubriko. Ni aldonos ankoraŭ kelkajn hodiaŭ por kompletigo.

Franclingvanoj devas atenti ne uzi la vorton *konferenco* en la senco de *parolado* (ĝi nur havas la sencon de *kunsido);* komencantoj ankaŭ facile emas uzi *deveni* anstataŭ *iĝi, fariĝi* (ĉar la nacia lingvo logas al tia uzo). Anglalingvanoj ofte uzas „inĝeniero“ en la senco de *maŝinisto* (tamen *inĝeniero* laŭ la esperanta signifo estas persono studinta k kapabla direkti laborojn, konstruadon ktp). Slavlingvanoj, kiuj ne konas en siaj idiomoj la difinitan artikolon *(la),* devas atenti pri ties korekta uzado; ofte ni trovas eĉ en presaĵoj ĝian mankon, kiam ĝi estas necesa, aŭ ĝian ĉeeston, kiam ĝi ne devus esti uzata. Rusoj ankaŭ emas skribi „jen kial“ anstataŭ *tial,* trouzi „multe da“ anstataŭ *multaj* k. s.

Gek-doj! Zorgu pri pura uzado de la lingvo; la pli spertaj kontrolu la malpli spertajn; praktiku la vivantan lingvon esperanto tia, kia ĝi devas esti: senigita de nacieca spirito!

L. L.

De infanoj por infanoj.

Ĉu vintro?

Nun estas vintro; sed nun ne estas vintro. Cu la atmosfero same freneziĝis kiel jam la tero? Mi atendegas la neĝon tiel kiel la germanoj iam atendegis la belegajn tempojn, al kiuj ilin volis konduki Vilhelmo la II. Mia glitveturilo sekiĝas en la subtegmento kiel mia stomako dum la krizo. Tempoj belegaj!

Egon (10-jara), Berlin-Neukölln.

[1] Vidado je malproksimaj distancoj.

Miaj pupoj interparolas.

Sekrete mi staris apud mia pupoĉambro. Miaj pupoj babilis. Helenjo diris: „Ho, kia bela vetero, vidu, kiel la suno brilas! Ni iru al la sablejo por foseti.“

„Ne,“ respondis Anjo, „mi estas laca, mi deziras dormi.“

„Pah, vi estas dormemulino,“ rediris Helenjo. „Venu do ludi.“

Anjo: „Vi povas saĝe parolaĉi, via patrino enlitigis vin jam je la 20-a; sed mi devis labori ĝis la 24-a.“

Ŝi kuŝiĝis sur la divanon k tuj ekdormis. Nur la eta ŝpico[1] bojis: *Vaŭ vaŭ!* Ĝi volis akompani Helenjon, ĉar la bela vetero invitis ĝin.

Edito (11-jara, Neukölln).

La suno.

Malantaŭ la nigra domomuro, vid-al-vide
de mia fenestro, loĝas la suno.
Se la ĉielstrato estas klara,
Ĝi ekbrilas,
kaj marŝas la vojon ĝis la najbara domo.
Ĝi ridas k egalas al nobla sinjorino,
kiu vizitas malriĉajn homojn.
Se pluvas,
ĝi ne promenas.
Ofte la granda fabrika kamentubo
ekblovas densan fumegon en ĝian vizaĝon.
Nun ĝi ekĉagreniĝas.
Ĝi ne ŝatas nian nigran straton
kaj venas de tago al tago pli malofte.

Petro (11-jara).

Tri grandeguloj.

Tri grandeguloj staras antaŭ mia lernejo. Ili rigardas tra la klasfenestro. Kiaj malobeemaj infanoj, ili pensas. La geknaboj ja tumultegas k tute ne atentas pri la instruisto. Kion vi volas sur la benkoj k tabloj, vi sentaŭguloj, ili vokas. Ĉu vi volas lerni aŭ kaptludi? Se vi ne baldaŭ silentos, ni sendos bastoneton al via instruisto, iun tagon ili vokis.

Ĉu vi scias la nomon de la grandeguloj? Estas tri grandaj poploj. *Rolf (10-jara).*

La materialon por tiu ĉi rubriko komunikis al ni K-do Wittbrodt, *lernejestro de senreligia lernejo en Berlin-Neukölln (Rütlistr.); 90 infanoj en tiu lernejo lernas esp-on k legas „La Lernanto“-n. Kiu imitas? Kiu helpas doni mondskalan kadron al tiu ĉi rubriko?*

[1] Hundospeco.

Je malaltigita prezo:
Proletaria Kantaro
74 kantoj el 22 nacioj. Unika kolekto da laboristaj kantoj KUN MUZIKNOTOJ.
180 paĝoj. Prezo nur: 2 mk.g.
SAT, Kolmstr. 1, Leipzig O. 27.